

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2022. №3



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2022. №3 (313)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

Retpoŝtaj adresoj: sezonoj@kanet.ru, laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2023

Abonanto: 15 eŭroj, 15 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 30 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 100 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (25000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (1500 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (750 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (500 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2022, №3 (313).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 5 октября 2022 г.

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Temo	5
Jukka Pietiläinen. La 107a UK: Reala en Montrealo	6
Deklaro de la 107a Universala Kongreso de Esperanto	8
Aleksander Korjenkov. Ĵenja Amis: “Mi estas feliĉa, kontenta kaj fiera” (Intervjuo kun Ĵenja Amis)	9
12 diplomoj pri Elstara Agado aljuĝitaj en Montrealo	15
Premio Deguĉi 2022 al Osioka Taeko	16
Rezulto de la Belartaj Konkursoj 2022	17
Eventoj	19
Gražina Opulskienė. Sukcesa BET-56 malgraŭ la milito kaj pandemio	20
Povilas Jegorovas. BET-56: 263 aliĝintoj el 31 landoj	22
Renato Corsetti. Por malkovri Amerikon, oni bezonas italon	23
Novembro: Reta KER-ekzameno je nivelo C2	25
Ulrich Matthias. KEF en Svislando kun riĉega programo: elstara festivalo, eĉ se nur kvalite	26
Gyöngyi Mézes. Medicinistoj denove kongresis en Hungario	28
Denis Eckert, David Guérin. Pacismo en praktiko: ĉu ekzistas esperanta vojo?	29
François Lo Jacomo. Muziko kaj Esperanto en la Tago de Paco de Unesko	31
Russ Williams. Arkones denove!	34
Ilona Koutny. Surloke kaj distance, serioze kaj amike: Interlingvistika sesio de AMU	36
Irina Gonĉarova. Temploj kaj Urboj: Jaroslavlo 2022	37
Irina Gonĉarova. La lingvo por sukceso: Esperanto en somera infana tendaro	38
Irina Gonĉarova. Esperanto en somera porinfana klerigejo	40
Vytautas Šilas. Pri tempo estonta pensante	42
Povilas Jegorovas. La Zamenhofa ekspozicio plu marŝas tra Litovio	43
Statistike pri la 78a IJK	44
Estraro de TEJO 2022-2023	44
Spomenka Štimec. Jubilea festo en Hraščina	45
Elekto de estraranoj kaj direktoroj de la Akademio; novaj sekcio kaj komisiono	46
UEA eksigis la ĉefdelegiton en Rusio	47
Osmo Buller. Clay Magalhães: Ne plu KKS	48
Transdono de la Arkivo de UEA al la Esperantomuzeo	49
Nova Estraro de UEA: Estraraj fakoj dividitaj	50
Marek Mazurkiewicz. Nova Estaro de Pola Esperanto-Asocio	50
Nova asocio de esperantlingvaj advokatoj	51
Premio Maŭro La Torre 2022	51
Lu Wunsch-Rolshoven. Novjara Renkontiĝo denove en Wiesbaden	52
La 108a Universala kongreso okazos en Torino	54

Bert Šuman. Riĉa oktobra programo en la kastelo Greziljono.....	55
Heinz-Wilhelm Sprick. KEKSO: La trideka fojo.....	56
Tribuno	57
Deklaracio de la 95a Kongreso de SAT	58
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Neperforto	59
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Paco	60
Iĝu Komitatano B de TEJO	61
Volontuloj kaj specialistoj serĉataj	61
Partoprenu en Duolingo-kunvenoj	62
Stanislav Belov. Filofeo, ukraino kiu baptis Siberion.....	63
Arkivo	72
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2022	73
Aleksander Korĵenkov. Antaŭ 45 jaroj: La unua Ora SEJT ĉe pitoreska lago	76
Kulturo	78
Aleksander Korĵenkov. Maksimume amara vivo	79
Maksim Gorĵkij. Foje en aŭtuno. La naskiĝo de homo. Helgriza kaj lazura. La gvidisto (Tradukis Vladimir Jurganov, Aleksander Korĵenkov, Ludmila Novikova)	81
Paulo Sérgio Viana. Dankon, dankon... ..	105
Laure Patas d'Illiers. Vivi	108
Miguel Fernández. Hispana poeto super poetoj: Juan Ramón Jiménez	110
Carlo Minnaja. Aktualigo kaj aktualeco.	116
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Nova libro: <i>Enkonduko en la morfologion de Esperanto</i>	119
Stanislav Belov. "Kuru, knabo, kuru" – utila konsilo dum Holokaŭsto (Recenzo: Uri Orlev. <i>Kuru, knabo, kuru</i>)	120
Nikolao Gudskov. Pozitiva rezulto de "memizoliĝo" (Recenzo: Roman Dobrzyński. <i>Verda simio</i>).....	122
Johannes Genberg. Ĝi estas bona albumo (Recenzo: Vojaĝo. <i>Intergalaksia</i>)	124
Belartaj konkursoj de UEA en 2023	125
<i>Literatura Foiro</i> , 2022, №318	126
<i>Literatura Foiro</i> , 2022, №319	126
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. <i>La Ondo</i> jubileas: 1000 tagoj da senĉesa informado	127
Mozaiko	129
Stanislav Belov. Ĉu preĝi aŭ ne preĝi?	130
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj	131
Perantoj de <i>La Ondo de Esperanto</i>	132

Kovropaĝe: La kongresa temo de la Montreala UK estis "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj", la indiĝena temo aperis ne nur en kunsidoj, kursoj kaj prelegoj, sed ankaŭ en la arta programo. (Foto: John Huang)



La Loka Kongresa Komitato (LKK) de la 107a Universala Kongreso de Esperanto bone faris sian laboron, kaj la Estraro de UEA aljuĝis al LKK diplomon pri Elstara Agado “pro la multjara laboro (2014-2022) por reokazigo de UK en Kanado, pro intensa kunlaboro por retaj eventoj dum la pandemio kaj pro sukcesa laboro por la unua UK en pandemia epoko”. Legu pri la Montreala UK en la sekvaj paĝoj. ((Foto: John Huang)

La 107a UK: Reala en Montrealo

**107a Universala Kongreso de Esperanto
Montrealo, la 6-13an de aŭgusto 2022**



Post du jaroj da nuligoj pro la pandemio, finfine eblis renkontiĝi reale en Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo. La kongreso estis planita jam por la jaro 2020, sed ĝi povis okazi nur nun. Alveno al Kanado eble ne estis same facila ol kutime, sed ankaŭ temis pri neeŭropa lando, kiu pli atente kontrolas eĉ alvenantajn eŭropanojn. Kroma aldono estis plenigo de reta saninforma enketilo, kiu tamen estis relative simpla afero. Mi fakte dubas, ĉu iu, kiu vere volas vojaĝi, respondus jese al demandoj pri sanstato.

La kongresejo estis en unu el la konstruaĵoj de la universitato de Kebeko en la urbocentro. La ejo estis bone funkcia, nur la granda salono por la inaŭguro kaj vesperaj programoj troviĝis aparte, tamen en piedira distanco el la kongresejo. Krome en la kongresejo estis ankaŭ eksteruloj, plejparte studentoj, kio foje igis la vicajn en kongreseja restoracio iom pli longaj.

La programo estis kutima, eble pro pli malgranda partoprenantaro ol kutime. Min aparte interesis la prelegoj pri Kanado kaj ĝia lingvopolitiko. Mi informiĝis pri la batalo por la franca lingvo en Kebeko. La lingvopolitiko estas nuntempe tre modela, ĉiuj publikaj tekstoj estas kutime nur en la franca, kaj privataj komercaj tekstoj ofte ankaŭ nur en la franca, foje ankaŭ en la angla, sed kun malpli grandaj literoj. Tamen granda parto el la loĝantoj de Montrealo estas anglalingvaj, en iuj urbopartoj eĉ plimulto. La proporcio de franclingvanoj malrapide malkreskas en Kebeko, kvankam la proporcio de anglalingvanoj estas stabila. Kreskas la kvanto de homoj kiuj parolas iun alian lingvon.

La batalo por la franca lingvo ankaŭ kaŭzis, ke Kebeko dufoje voĉdonis por ricevi sendependecon, kaj en la lasta fojo en jaro 1995 preskaŭ duono estis por sendependeco. Poste, kun pli fortaj lingvaj rajtoj kaj plia aŭtonomeco, la emo sendependiĝi malkreskis.

Unu el lokaj indiĝenaj lingvoj, la aniŝinaba lingvo, estis instruata en la kongresa programo. Mi eksciis, ke en la aniŝinaba lingvo la vorto por la franca lingvo estas laŭvorte “la lignoboata lingvo” kaj la vorto por la angla lingvo estas prenita el la franca.

Ankaŭ en la kultura programo aperis indiĝena muziko, kiun en la nacia vespero

prezentis irokezoj kaj inuitoj. La inuita virina gorĝa kantado estis io, kion mi neniam antaŭe aŭdis. Unu el la mirindaĵoj de la kultura programo estis monologa teatraĵo, kiun prezentis membro de LKK Garry Evans, kiu plenumis la rolon de S-ro William Mann, brita esperantisto el la tempo antaŭ pli ol cent jaroj. Temis pri la vizito de Ludoviko Zamenhof al Usono kaj Kanado okaze de Universala kongreso de la jaro 1910. La teatraĵon verkis Ĵenja Amis, ankaŭ LKKano. Por la malgrandaj LKK kaj organiza teamo vere ne mankis taskoj.

Aparta novaĵo estis la nova nivelo de KER-ekzamenoj, C2 do la plej supra, kiu egalas al denask-nivela lingvoscio. Nur unu persono partoprenis kaj trapasis la ekzamenon, kaj al mi li konfesis, ke la ekzameno estis malfacila. Kaj eĉ por bonparolanto ĝi ja devus esti tia. Mi mem ne kuraĝis provi. Jen nova defio al bone parolantaj esperantistoj.

La vetero komence atingis varmegon de pli ol 30 gradoj, sed post pluvo en lundo la temperaturo falis ĝis agrabla 20-25 gradoj.

La kongreso estis la unua, kiun organizis la nova kongresa teamo, kiu funkcias en Slovakio, kien estonte ankaŭ la libroservo de UEA estos translokita. La nova teamo ankoraŭ ne ŝanĝis multajn aferojn, sed aperis kelkaj novaĵoj.

Unu el la novaĵoj estis la kongresa aplikaĵo instalebla al poŝtelefono. Ĝi montriĝis utila, eblis trovi novajn programerojn kaj lokojn. Tamen okazis almenaŭ du misoj: unu el la prelegoj pri Kanado estis laŭ aplikaĵo nuligita, sed ĝi fakte okazis; kaj unu el kunsidoj estis indikita al malĝusta salono, tamen la ĝusta salono estis tuj apude. En tiuj okazoj la uzantoj de la kongresa libro dum unuaj tagoj havis pli ĝustajn informojn, tamen ĝis la fino de la semajno la aplikaĵo montris sian utilecon.

Unu el la novaj programeroj aperantaj nur dum la semajno estis diskuto pri Ukrainio. Eŭgeno Kovtonjuk rakontis pri siaj spertoj en Ukrainio, de kie li alvenis, kaj respondis al demandoj. La programero pasis en bonhumora kaj paca etoso, kvankam inter la kongresanoj eventuale ekzistis diversaj opinioj pri la milito. Ukrainio rolis ankaŭ en la kunsido de komitato de UEA, kie Kovtonjuk sukcesis insisti, ke la estraro de UEA decidu pri la eksigo de ĉefdelegito de UEA en Ruslando pro ŝia subteno al milito.

Ho ve, pro la nova kongresa organizado, aŭ eventuale temis pri la malorganizateco de Centra Oficejo de UEA, ne plu estis disdonitaj la premioj pri 40- aŭ 50-jara seninterrompa membreco. Iom bedaŭrinde, ĉar mi post kelkaj jaroj atingos tiun nivelon.

Pro la manko de komunikado eventuale okazis tio, ke la kongresa libro reklamis la IKU-librojn je la prezo 15 eŭroj, sed la kongresa libroservo vendis ĝin tute laŭ kutimo de kongresaj libroservoj jam delonge, per 21 kanadaj dolaroj (proksimume 16 eŭroj). Tamen ĝenerale la nova kongresa teamo funkciis relative bone, eventuale helpis la malgranda nombro da ĉeestantoj. Kaj la IKU-programo estis tute kutima, eventuale eĉ pli ampleksa ol en kutimaj UKoj.

La ĉefa movada novaĵo estis, ke la komitato de UEA elektis novan estraron, kiu

grandparte estas la malnova. Kaj la komitata kunsido, parte hibrida, ĉar kelkaj partoprenis distance, estis la sola loko, kie necesis porti maskojn. La rekomendo por uzi maskojn ekzistis, sed malmultaj ĝin sekvis. La postulo aperis post malsaniĝo de kelkaj kongresanoj. Ŝajne la nova realo estas, ke en ĉiu amasa renkontiĝo kelkaj personoj malsaniĝas je kovim-viruso. Do, temis ne pri la kongreso post pandemio, sed pri la kongreso dum pandemio, tamen malpli severa. La kongresaj organizantoj tamen sukcesis bone, malgraŭ malfacilaĵoj kiujn la pandemio kaŭzis.

Venontjare la kongreso okazos en Torino, Italio, kaj poste ekzistas plano por kongresi en Afriko, kvankam la fina decido ankoraŭ ne estas farita.

Jukka Pietiläinen

Deklaro de la 107a Universala Kongreso de Esperanto

La 859 partoprenantoj – el 57 landoj – de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Montrealo, Kanado, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2022, traktis la kadran temon “Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj.” Per teritoria agnosko en la malferma ceremonio de la Kongreso, ni esprimis nian profundan dankon al la diversaj indiĝenaj nacioj, unuavice la ganjenka popolo (Kanien'kehá:ka, Mohawk), kiuj neniam cedis siajn rajtojn je tiu teritorio, kie ni kunvenis.

Per prelegoj, filmoj, diskutrondoj, kaj ankaŭ lingvokurso pri la aniŝinabeka, ni lernis pri la granda diverseco de indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj en Nord-Ameriko kaj tutmonde. Ni konstatis, ke indiĝenaj popoloj ludas gravan rolon en la konservado de naturaj resursoj kaj biologia diverseco, kaj estas portantoj de fundamentaj scioj por nia daŭripova ekzisto sur la Tero. Ni krome aŭdis kiel, malgraŭ multaj baroj kaj atakoj al iliaj rajtoj, tiuj popoloj organiziĝas por daŭre plenumi siajn tradiciajn okupojn, konservi siajn kulturajn praktikojn kaj aserti siajn rajtojn je siaj teroj.

Honore al la komenco de la Internacia Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj (2022-2032), nia Kongreso eldonis novan tradukon en Esperanto de la Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj. Inter la multaj rajtoj agnoskitaj en tiu dokumento, ni aparte atentigas pri Artikolo 13, laŭ kiu “Indiĝenaj popoloj rajtas revivigi, utiligi, evoluigi kaj transdoni al estontaj generacioj siajn historiojn, lingvojn, buŝajn tradiciojn, filozofiojn, skribsistemojn kaj literaturojn, kaj asigni kaj reteni siajn proprajn nomojn por komunumoj, lokoj kaj personoj.” Kiel movado por lingvaj rajtoj, ni esprimas nian fortan subtenon al tiuj principoj.

La parolantoj de Esperanto alte taksas la valoron de kultura kaj lingva diverseco kaj kunlaboras por realigi lingvan demokration en monda skalo. Konforme al tiuj celoj kaj al la informoj kaj ideoj pritraktitaj en ĉi tiu Kongreso, ni deklaras nian solidarecon kaj subtenon al indiĝenaj popoloj en ties streboj por memdetermino, paco, justeco, kaj interkompreniĝo.



Jenja Amis ĉe la malfermo de la kongreso.

Ĵenja Amis: “Mi estas feliĉa, kontenta kaj fiera”

La sekretario de LKK respondas

Kiel vi fartas post la fino de la kongresa kaj postkongresa periodo?

Por ni, la montreala LKK, la poskongresa periodo daŭros eble eterne – aŭ almenaŭ tiom longe, kiom la preparado de la kongreso mem: ok jarojn! Sed serioze. Mi fartas bone. Nun bone. Se vi demandus al mi la saman aferon unu monaton antaŭ la UK, mi certe respondus alie. Mi estas feliĉa, kontenta kaj fiera, kaj mi certas, ke mi povas diri la samon pri ĉiuj aliaj anoj de nia LKK. Nun mi povas finfine pensi pri aliaj aferoj, plani aliajn projektojn kaj ne hasti ĉiun sekundon de ĉiu tago... Vi eble ridos, sed mi ricevis amuzan komenton ĉi-septembre, dum la Internacia Tago de Paco en Tolosa (Hispanio, Eŭskio), kie ni prezentis kun la Internacia Esperanto-Koruso. Tiu diris, ke mi nun aspektas kiel alia persono – kaj mi facile kredas. Estas bone finfine esti malstreĉita.

La kongreso estis prokrastita pro la koronavirusa pandemio; ĉu tio donis pli da tempo por la organizado, aŭ pli da klopodoj, ĉar eble iujn organizajn aferojn oni devis ripeti?

Kiam estis evidente, ke UK-2020 ne povas okazi, LKK faris unuaniman decidon: proponi Montrealon por la jaro 2022. Mi donos iom da kunteksto. En marto 2020, kiam la mondon frapis la koronaviruso, ni estis pretaj tiom, kiom eblas esti pretaj pri UK: la kontraktoj kun la ejoj estis faritaj antaŭ jaroj, la Unua Bulteno (kiu kutime aperas unu jaron antaŭe) estis preparita _du_ jarojn antaŭe: ni prezentis ĝin en Lisbono, en 2018; la Dua Bulteno (kiu plejofte pretas en februaro de la kongresa jaro) estis publikigita en decembro de la antaŭa jaro; ni havis liston de ĉiuj kanadaj prelegoj, kiujn ni farus, kaj ankaŭ ellaboris grandan parton de aliaj programeroj; ni havis belan kongresan temon kaj la reĝisoron, la ekskursaj kaj koncerta programo estis plene pretaj, ni planis publikajn ekspoziciojn, prelegojn, ktp... Resume, 2020 devis esti perfekta jaro por la perfekta kongreso, kun minimume 1500 personoj. Kaj tiu nombro ne estas hazarda: dum la unua aliĝperiodo (ĝis la fino de decembro 2019) aliĝis jam pli ol 500 personoj, kaj, historie, dum la unua aliĝperiodo aliĝas ĉirkaŭ triono de la partoprenantaro...

Bone, nun vi komprenas, ke en marto 2020 ni ne povis eĉ pensi plene rezigni pri la UK post tiom da laboro jam farita, kaj kun tiom da entuziasmo ĉirkaŭ la Montreala kongreso. Do, ni proponis nin por la kongreso en 2022: du jarojn post la originala dato. La decidon pri la jaro helpis al ni preni la kongresa kuracisto. Laŭ li, estis ĉ. 90-procenta ŝanco, ke la kongreso en 2022 povus okazi. Ni komprenis, ke la decido estis tamen riska – ja estis ŝanco, ke eĉ post du jaroj ekde la komenco de la pandemio la kongresoj ankoraŭ ne povos okazi. Sed prokrasti pli da tempo ni ne volis – kaj do ni faris la decidon en la espero, ke la mondo pli-malpli revenos al nova “normalo” – kiu ajn tiu normalo estus.

Nun vi estas plene en la kunteksto, kaj mi povas finfine respondi vian demandon! Do, tiam, en marto 2020, ni pensis ke ni “metos sur la breton”, por tiel diri, ĉion, kion ni faris ĝis tiam, rehavos niajn vivojn por ĉirkaŭ jaro, kaj kiam estos la ĝusta momento, ni “reprenos de la breto ĉiujn preparitaĵojn”, aldonos novajn, kaj jen, la UK pretos! Ni sincere pensis, ke eblos reuzi la plejparton de laboro jam farita, kaj ni ne povis esti pli foraj de la realo... Vi eble komprenas, ke eblis reuzi preskaŭ nenion el la laboroj, kiujn ni faris ĝis tiam. La kongresejo kaj la teatro estis aliaj; la arta buĝeto malgrandiĝis (ĉar oni atendis malpli da partoprenantoj), do, la koncerta programo devis esti refarita, kaj la samo validas pri la ekskursaj programo kaj alia programo – ĉar pluraj personoj, kiuj promesis prelegi, ne povis veni... Do la solaj aferoj, kiujn ni povis pli-malpli repreni de la antaŭa fojo, estis la kanadaj prelegoj – ĉio alia devis esti plene refarita.

Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Eventoj



Malgraŭ la malfacilaj cirkonstancoj la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj en Klajpedo estis interesaj kaj agrablaj por pli ol ducent partoprenantoj danke al la bona prepara kaj surloka organiza laboro de Povilas Jegorovas kaj lia teamo. (Foto: Gražvydas Jurgelevičius)

Sukcesa BET-56 malgraŭ la milito kaj pandemio

La 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56), okazintaj la 9-17an de julio en la Litovia havenurbo Klaĵpedo, kunigis 263 esperantistojn el tridek landoj, kaj ĉirkaŭ 230 el ili ĝuis semajnon en la Klaĵpeda universitato kaj en la urbo, ĉar Klaĵpedo ĉi-jare festas la 770-an datrevenon de la fondo.

La solena inaŭguro okazis en la urba koncerta salono, kaj ĉiujn bonvenigis koncerto de la kvinteto *Brass*, kiu ludis latunajn blovinstrumentojn kaj gvidis aŭskultantojn tra diversaj epokoj kaj stiloj de muziko.

La milito en Ukrainio kaj la pandemio malhelpis ĉeeston de pliaj aliĝintoj, sed la programo restis varia kaj abunda. Prof. Amri Wandel bonvenigis aŭskultantojn al prelegoj de SUS-38 de AIS. Li ankaŭ informis, ke ĉiuj prelegotekstoj estas eldonitaj en libro, aĉetebla en la libroservo de BET. La matenaj programeroj invitis esperantistojn al la prelegserio de prof. Duncan Charters pri kulturo kaj al la prelegciklo de prof. Ilona Koutny pri esperantologio.

Josef Reinwart informis pri ŝanco de esperantistoj ekkoni novajn sanigajn produktojn, Alfred Heiligenbrunner rakontis pri imuna sistemo, Manfred Westermayer prezentis du prelegojn “Renasanco de marĉoj”, pri nova instruada projekto “30 oraj horoj” raportis Brunetto Cassini. Ryszard Rokicki prelegis pri “Alternativa priskribo de Esperanta vortfarado” kaj prezentis sian libron *Enkonduko en la morfologion de Esperanto*, eldonitan de *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio ĵus antaŭ BET-56. Carlo Nicola Colacino parolis pri “Gravitaj Ondoj”.

En la Somera universitato pri la litovaj lingvo, kulturo, historio profesoron Aloyzas Gudavičius sukcese anstataŭis Aida Čižikaitė, okazis diversnivela Esperanto kursoj, gvidataj de ŝatataj instruistoj Nina Pietuchowska, Mikaelo Lineckij, Dalia Pileckienė, Aida Čižikaitė.

Ankaŭ la posttagmezoj plenis je eblecoj: Grażyna Szubryczyńska dividis siajn spertojn en prelegoj “Esperanto en infanĝardeno” kaj “Ekologio en infanĝardeno”, Tuomo Grundström rakontis pri la verkistinoj Hella Maria Wuolijoki kaj Aino Julia Maria Kallas, Margarita Želve gvidis nin tra “Kvar granddamoj de Latvia Esperanto-poezio”. Al Afriko ĉeestantojn invitis Gediminas Degėsis, kiu bone konas la kontinenton, provante ŝanĝi niajn stereotipojn kaj antaŭjuĝojn pri tiu parto de la mondo. Spertojn de germanaj esperantistoj en daŭripova agado konigis Ulrich Brandenburg, diskutojn pri la agado de UEA kaj ĉefe pri ties reago al la milito en Ukrainio elvokis la programero “UEA hodiaŭ”. Ankaŭ la seminario pri aktivula maturigo (AMO) kun la temo “Baltio en Eŭropa Kunteksto” gvidata de Stefan MacGill kaj la ateliero pri tradukado gvidata de István Ertl allogis plurajn partoprenantojn de BET.

Dum la tuta semajno funkciis libroservo modele prizorgata de Irena Jagminaitė. Eblis elekti inter la plej novaj eldonoj kiuj aperis speciale por BET kaj inter pli frue eldonitaj libroj kaj revuoj. La ok numeroj de la lukse eldonita BET-gazeto *Lumturo* estis ofte videblaj en la mano de esperantistoj – kaj pro la utilo havi la programon

ĉemane kaj pro la interesa enhavo, abundaj fotoj kaj kurtaj raportoj. La redaktoro Choe Taesok kaj la kongresa fotisto Gražvydas Jurgelevičius multe laboris, por ke *Lumturoj* estu informriĉaj kaj interesaj por legantoj. Ĉiujn numerojn eblas legi en la retejo de LEA <http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET56>. Ĉiu partoprenanto ricevis la esperantlingvan informilon *Malkovru Klajpedon* kaj la *Libron por BET-ano*.

La vesperaj kulturaj programeroj bele kompletigis la instruan, sciencan kaj klerigan programon de BET.

Koncertoj de Saša Pilipović kaj Georgo Hanzlik, Anjo Amika, muzikgrupo Sepa kaj “Asorti” arigis esperantistojn en la granda aŭlo de la universitato. Ĉar Mikaelon Bronštejn por kantado anstataŭis Sergeo Straŝnenko, la aŭtoro de la kantoj legis por ni siajn versojn per Zoom. Post la oficiala programo ĉiuvespere grupeto de kantemuloj restis kune kaj, inspiritaj de Mikaleo Lineckij, Natalia Ivanova kaj Sergeo Straŝnenko, kantis diverslingvaj kantojn kun gitara akompanado.

En BET-56 estis grupeto de gejunuloj kiuj ofte organizis sin por ekskurseti aŭ ludi, por ĝui koncertojn en la urbo aŭ simple promeni. La kerno de la junulara grupo formiĝis jam printempe en Italio dum IJK, sed ankaŭ aliaj gejunuloj rapide intermikiĝis. Proksimeco de la maro logis multajn, sed la vetero, kvankam suna, estis freŝeta almenaŭ por gastoj de sudaj landoj.



Foto de Gražvydas Jurgelevičius

Neniu BET okazas sen ekskursoj, kaj la sperta organizanto Antanas Visockas zorgis, ke esperantistoj ekkonu la regionon. Krom perpieda ekskurso tra Klajpedo partoprenantoj vizitis la Kurŝan Terlangon, apudlagunan regionon kaj eĉ japanan ĝardenon kreitan en Litovio. Merkrede multaj esperantistoj memstare ekskursis gvidataj de litovaj samideanoj.

BET-56 finiĝis per kutimaj ĝisrevidoj, dancado de Laima Vilkelytė, bela kanto de la 15-jara Gabija Okeana Gričiūtė kaj nekutima fina koncerto. Kortuŝaj kaj senco-plenaj kantoj de niaj Ukrainiaj amikoj, speciala etoso kiu regis en la salono kaj dum la tuta BET ne lasis dubojn, ke esperantistoj kondamnas la militon kaj kore esperas, ke Ukrainio sukcesos defendi sian kaj nian sendependecojn.

La 18an de julio ni disiris al niaj hejmoj, kelkaj eksterlandanoj ankoraŭ ekskursis tra Litovio, sed en niaj planoj por la venonta somero jam estas BET-57 en Latvio, kiu espereble okazos en la belega urbo Ventspils. Ni esperas, ke ĝis tiam la mondo iĝos sana kaj paca...

Gražina Opulskienė

BET-56: 263 aliĝintoj el 31 landoj

Kun konsidero de la surlokaj aliĝoj, al la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj aliĝis 263 aliĝintoj el 31 landoj. La plej multaj aliĝintoj estas el Litovio – entute 116 personoj, t. e. 44% de la tuta BETanaro.

Vidu la laŭlandan tabelon de la aliĝintoj al BET-56.

116 Litovio

23 Pollando

18 Latvio

15 Germanio

13 Ruslando

9 Francio, Italio

7 Estonio, Pakistano

6 Ukrainio, Finnlando

5 Hungario

3 Usono, Ĉeĥio

2 Israelo, Serbio, Svedio, Hispanio, Slovakio, Svislando

1 Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Belorusio, Islando, Koreio, Kubo, Luksemburgio, Malio, Nederlando, Portugalio,

Entute: 263 personoj el 31 landoj.

Bedaŭrinde, pro la neebleco ricevi la EU-vizojn, al Klajpedo venis neniu el la aliĝintoj el Ruslando kaj Belorusio, kaj reale partoprenis ĉirkaŭ 230 personoj.

Povilas Jegorovas



Por malkovri Amerikon, oni bezonas italon

Mi konsentas. Li, Kristoforo Kolombo, malkovris Amerikon hazarde, ĉar li havis tute alian celon: atingi Hindujon, sed eraris pri la kalkuloj. Aliflanke li malkovris ĝin kaj, kiel diras itala amuza poemeto: se li havus la modernajn maristajn ilojn, li eble malkovrus dekon da ili.

Sed kial mi rakontas pri la malkovro de Ameriko, kiam mi devas paroli pri la ĉi-jara itala Esperanto-kongreso, kiu okazis en Breŝo [Brescia] en norda Italujo, de la 20a ĝis 27a de aŭgusto?

Mi parolas pri tio, ĉar ankaŭ italaj esperantistoj estas italoj kun la samaj virtoj kaj malvirtoj de Kristoforo Kolombo aŭ Marko Polo. Ili estas nekonsciaj pri la realo kaj sekvas siajn revojn. La ĉefa mesaĝo al la esperantista mondo, kiun oni ricevas de la ĉi-jara itala kongreso estas, ke Zamenhof ne mortis, ke liaj idealoj pri frateco inter la popoloj kaj interkompreniĝo estas io, pri kio oni fiere rajtas paroli al la neesperantistoj, kvazaŭ ni estus en la esperoplena komenco de la pasinta jarcento, kvazaŭ ne estus okazanta milito tute proksime, kiu provas egali pro krueleco kaj katastrofoj la antaŭajn militojn.

Kaj pri tio ili abunde parolis al la neesperantistoj dum la lasta semajno de aŭgusto, per la helpo de alia nerealisma italo, la urbestro de Breŝo, kiu deklaris la kongreson parto de la kultura aktivado de la urbo kaj donacis al la esperantistoj ĉion, kion li povis donaci, ekzemple normalan urban aŭtobuson regule transportantan la urbanojn dum la kongresa semajno, kiun oni tute repentis per reklamo pri Esperanto, kaj ankaŭ rabatitajn biletojn por la urbaj trafikiloj por la kongresanoj. Krome oni faris la vesperajn ĉefe muzikajn programojn en bela renesanca korto de iama urbestrejo en ĉeesto de la loka neesperantista publiko. Esperantistoj kaj breŝanoj ĝuis koncertojn de Jomo, Kimo, Nissim, Raggi kaj teatraĵon en la itala pri la vivo de Zamenhof de Mario Migliucci. Sed, por tiuj kelkaj breŝanoj, kiuj ankoraŭ ne sciis pri Esperanto, oni projekciis en la kadro de somera film-serio de la urbo filmon pri la vivo kaj morto de la itala esperantisto-anarĥiisto, Giuseppe Pinelli, iam arestita por havi kulpulon de atenco, pri kiu li estis tute senkulpa.

Malgraŭ tio, ke la kongreso okazis en la sama semajno, kiel la TEJO-kongreso en Nederlando, la esperantista partopreno estis abunda kiel kutime kaj venis pli ol 200 homoj el la tuta Eŭropo, eĉ el Islando aktive partoprenis. Afrikanoj ne ricevis la eŭropan Schengen-vizon, sed la unuagradan kurson gvidis nova italo, Mian Salam Shany, pakistandevena esperantisto loĝanta en Breŝo. Vi komprenas, ke la multkultura socio en Italujo estas jam realaĵo. La kurson por progresantoj gvidis Marc Giraud el Francujo.

Eble mi devas diri ankaŭ ion pri la enhavo de la kongreso, kies temo estis: “Paco ne okazas hazarde: la aktiva rolo de ĝemel-urbaj rilatoj en la konstruo de eŭropa popolo”. Kaj ĝi ne rolis nur formale en la anoncoj pri la kongreso, kiel kutime okazas (kiu el la legantoj povas memori la kongresan temon de la laste ĉeestita

kongreso?). Oni serioze debatis pri ĝi, ankaŭ kun politikaj reprezentantoj de la urbo, kvazaŭ en Eŭropo la pluraj eŭropaj popoloj ne estus nun ĉefe okupataj pri luktado inter si, pri kiu gajnas kaj kiu malgajnas pro la manko de gaso. Kaj krome, ĉiam en la kadro de kunlaborado inter eŭropaj urboj per la programo “Erasmus” Teresa Pomorska el Pollando venigis grupon de 27 lernantoj, kiuj partoprenis la kurson pri Esperanto.

Sed krom la debatoj pri la kongresa temo okazis du seminarioj unu pri mond-politikaj temoj (kiuj, krom italoj, pretas nun paroli pri tiaj temoj?). Ĉi tiu unua seminario estis gvidata de Javier Alcalde, konata kataluna hispano, kiu priskribis detale la problemojn ĉirkaŭ la mediteranea maro, de Maroko al Turkujo tra Tunizio, Egiptujo kaj Israelo kaj Libano. Vi povas imagi la emociojn, kiujn vekis la debato pri la suferoj de la homoj en ĉi tiu parto de la mondo, kiun franca klerulo iam nomis “la kontinento Mediteraneo”, kaj kiu nun malsanas pro problemoj kaŭzataj de aliaj kontinentoj.

La dua seminario estis pli teĥnika. Ĝi estis gvidata de Debora Rossetti pri sociaj retejoj, kaj kiel utiligi ilin por Esperanto. Ne ĉiuj esperantistoj kun aĝo preter tridek jaroj povas facile salti de Instagram al Telegram aŭ anonci en TikTok, sed Debora povas.



Italaj kongresoj, malgraŭ ĉio, ankoraŭ provas konkurenci kun la universalaj kongresoj pri la daŭro, unu semajno, kaj pri la enhavo. Fakte krom la kursoj, okazis kunvenoj de instruistoj. Italujo havas italan sektion de ILEI. Kaj okazis ankaŭ ekzamenoj en pluraj niveloj de la Itala Instituto de Esperanto.

Necesas diri, ke la italo, kiun oni devas danki pro ĉio estas Luigi Fraccaroli, loĝanta en Breŝo, prezidanto de la itala landa asocio, ŝatanto de Eŭropo, de ĝemelaj urboj kaj de paco.

Mi preskaŭ finis mian rakonton, sed mi devas aldoni, ke ĵurnalistoj ankaŭ de la nacia televido venis filmi kaj intervjui, kaj aperis multaj artikoloj. Ni aldonu plian plaĉan anekdoton, kiun mi spertis persone. Dum ekskurso al Verono, la Esperanto-ekskursantoj vizitis la domon de Julieta kaj Romeo, kaj apud ĝi la grupo marŝis malantaŭ sia flago, kiam oni renkontis kaj rekonis kaj aplaŭdis la internacie konatan operkantiston Placido Domingo, kiu haltis, alproksimiĝis al la flago kaj malkovris ke temas pri Esperanto, lingvo, kiun li ĉiam subtenis kaj nun finfine volas lerni.

Do, la venontan jaron, se vi ne venis ĉi-jare al la lando, kie, laŭ Goeto, la citronoj floras kaj la oranĝoj brilas tra la malhela foliaro, venu por partopreni la Universalan Kongreson de UEA, okazontan en Torino, kaj la kongresojn de ILEI kaj TEJO okazontaj apud Venecio. Ĉio okazos en Italujo post unu jaro, kaj vi povos iomete infektiĝi pri la itala nerealismo, kiu portis al la malkovro de Ameriko kaj povus porti al la progreso de Esperanto.

Renato Corsetti

Novembro: Reta KER-ekzameno je nivelo C2

En 2022 la KER-ekzamena Centro de UEA lanĉis la ekzamensistemon je la plej alta nivelo de la ekzamensistemo, ellaborita laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Pri la ellaborado de la postuloj kaj testotipoj de tiu C2-nivelo aparta teamo de fakuloj laboris dum pli ol unu jaro. Spertaj esperantistoj kaj lingvistoj testis la unuan provserion kaj KER-EC, helpe de speciala KER-laborgrupo de la Akademio de Esperanto, ellaboris somere la unuan veran teston, kiun ni uzis en ĉeesta, pa-pera ekzameno dum UK-107 en Montrealo.

Responde al la intereso de la esperantistaro KER-EC pretigos novan testserion, laŭ kiu eblus ekzameniĝi rete.

La ĉefaj ekzamentagoj estos la 26a kaj 27a de novembro. La individuajn parolajn partojn ni okazigos en la proksimaj datoj de tiu semajnfino. La ekzameno povos okazi, se aliĝos minimume 20 personoj. Ni esperas, ke multaj esperantistoj eluzas la eblon kaj trapasos la ekzamenon.

Specimenoj kun solvoj: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker/specimenoj>.

Aliĝilo: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj>.

Kondiĉoj ekzameniĝi rete: <https://edukado.net/ekzamenoj/ker/proctor>.

Edukado.net

KEF en Svislando kun riĉega programo: elstara festivalo, eĉ se nur kvalite

Post dek Kulturaj Esperanto-Festivaloj, kiuj okazis inter 1986 kaj 2013 en skandinaviaj landoj, iom surprize aperis la invito de Kultura Centro Esperantista kaj Studenta Esperanta Ligo (du organizoj ligitaj al la Esperanta Civito) al la 11a KEF en La Chaux-de-Fonds en Svislando de la 9a ĝis 15a de aŭgusto 2022. Ĝi allogis min pro pluraj kialoj – pro mia deziro, finfine viziti tiun ĉi faman esperantistan centron, sed aparte pro la mirige abunda programo. Precipe pro la anonco de koncertoj de pluraj el miaj plej ŝatataj esperantistaj kantistoj mi ne povis rezisti aliĝi.

Kaj efektive la KEF eĉ alte superis miajn atendojn. Laŭ partoprenantaro temis nur pri malgranda aranĝo, ni estis 20 plentempaj partoprenantoj, al kiuj aldoniĝis 10 partatempuloj, kiuj venis plejparte por kontribui al la programo kaj restis nur unu aŭ du tagojn. Sed laŭ la programo, la KEF apartenis al la plej bonaj aranĝoj, kiujn mi iam ajn vizitis.

Aparte ĝojiga estis la ĉeesto de *Kajto*, famega muzikgrupo konsistanta nun el la duo Ankie kaj Nanne. Ili faris ne nur belegan koncerton por ni, sed ankaŭ kantigis nin dufoje en muzika ateliero per siaj jen pensigaj, jen amuzaj, sed ĉiam mirinde harmoniaj kantoj. Ili partoprenis la tutan KEF kaj zorgis ankaŭ ekster siaj programeroj pri agrabla atmosfero. “Mi ne sciis, ke *Kajto* estas tiel simpatia”, – diris KEFano, kiu konis la muzikgrupon antaŭe nur el la reto.

Plia elstara programero estis por mi la koncerto de Chiara Raggi. Ŝiaj kantoj estas plenaj je sentoj kaj emocioj, kaj estis aparte bele ĝui ilin de proksime en malgranda rondo. Sukcesaj estis ankaŭ koncerto de Anjo Amika en preĝejo kaj la koncerto de JoMo en la lasta vespero: Li sukcesis dancigi pli-malpli ĉiujn KEF-anojn. Unu semajnon poste li ripetis sian koncerton en la Itala Esperanto-Kongreso, kie malgraŭ dekobla partoprenantaro dancis apenaŭ pli da homoj.

Menciindas krome diversaj korpaj ekzercoj, ekzemple pri jogo kaj ĉigongo, kaj aparte la masaĝoj de Katalin Faragó, kiuj freŝigis nin korpe kaj anime; ŝi klarigis al ni ankaŭ la Yumeiho-terapion. Sukcesaj estis ankaŭ multaj pliaj programeroj, ekzemple de Giuliano Turone, kiu aktore prezentis al ni diverslingvajn tradukojn de *Dia Komedio* de Dante, kaj ronda tablo pri la Esperanta kulturo en la 2020aj jaroj.

Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Arkones denove!

Arkones (ARtaj KONfrontoj en Esperanto) okazas de kelkaj jardekoj ĉiuseptembre en Poznano, Polujo. Samkiel multaj tradiciaj eventoj, Arkones ne okazis en 2020 kaj 2021 pro la pandemio, sed ĉi-jare ĝi reaperis por la 36a fojo la 23-25an de septembro 2022. Ĝi estis iomete malpli granda ol kutime, ĉu pro ankoraŭaj hezitaj kaj zorgoj pri kovimo, ĉu pro neeblo por ruslandanoj veni pro la fia milito. La programo ĉi-foje estis dutraka (mi memoras tritrakajn programojn antaŭe). Tamen iom pli ol cent homoj el 16 landoj aliĝis, kaj plejmultaj el ili (sed ne ĉiuj) venis. Malgraŭ la pli malgranda programo, okazis multo, do tute ne eblis vidi ĉion, sed jen miaj impresoj:



Ĝi estis mia unua Esperanto-aranĝo de kiam la pandemio trafis. Estis certe agrable kaj interese reeniri Esperantujon denove, renkonti malnovajn amikojn, ekkoni novajn homojn, aŭdi muzikon, aŭskulti prelegojn, kunpromeni kaj kunmanĝi, ktp.

La programo, kiel ĉiam, estis kombinaĵo de tradiciaj ŝatataj eventoj kaj iuj unikaĵoj. Temante pri tradicio, Zuzanna Kornicka kaj Anjo Amika ambaŭ ĝinde koncertis, kiel kutime, kaj tio donis belan senton pri vera reveno al Arkones! Mi apenaŭ imagas Arkoneson sen laŭta kunkantado de la refreno “Hej! Hej!” dum la kanto *Sokoŭj* (Nizoj).

Dum la inaŭgura vespero okazis koncerto de Oksana Kovalivska, kiu loĝas en Polujo dum ses monatoj, rifuĝinte de la milito en Ukrainujo. Ŝi bele kantis plurajn ukrainajn kantojn, inkluzive de la lastatempe furora kanto “Ruĝa viburno”. Trupo de ĉirkaŭ dek ukrainaj junaj dancistoj prezentis ege emocian baleton pri la malĝojo kaŭzita de la milito. Ili ankaŭ prezentis pli gajan dancon. Mi aŭdis plurajn homojn diri, ke tiu ukraina kanta kaj danca prezento tre kortuŝis ilin; certe mi sentis kortuŝon.

La milito sentiĝis ankaŭ alimaniere. Mankis ruslandaj esperantistoj en Arkones pro la milito; certe multaj sentis la mankon de la tradiciaj partoprenantoj AIKo kaj Halina el Kaliningrado. Krome estis milit-tema programero “Kion post la milito?” kun Pascal Dubourg Glatigny, István Szabolcs, kaj István Ertl, kiu krome prezentis siajn tradiciajn preskerarojn kaj *Beletran Almanakon*, kaj krome nekutiman interesan prezenton pri tio, kial li eklernis la estonan! Pascal ankaŭ prezentis la historion de la franca esperantisto Lucien Péraire, kiu biciklis de Eŭropo ĝis orienta Azio (1928-1932) kaj lasis multajn kajerojn, kiujn oni ciferecigas.

Tim Owen prezentis tre interese la eldonajn procedojn kaj librojn de Esperanto-Asocio de Britio. (Mi ĝojas, ke baldaŭ aperos kompleta poemaro de Marjorie



La ukraina danĉprezentado en Poznań (Foto: Mirosława Kubicka)

Boulton!) Alia prelego de Tim estis verŝajne mia plej ŝatata ĉi-jare: li sprite rakontis siajn interesajn (kaj ofte tre amuzajn) historiajn esplorojn pri simboloj de Esperanto, ekzemple kiam kaj kial fakte ekuziĝis la verda stelo? Kaj ĉu vi scias, ke iu proponis fajfan signalon por rekoni surstrate aliajn esperantistojn, kaj alia proponis mangestan signon? Post iom da teorumado pri kiaj ecoj bonas por simbolo, li fine rakontis pri la cerbumado por fari novan logotipon de EAB kaj klarigis la subtila kaŝitan signifon de la fine elektita logotipo. Mi jam admiris la subtilan lertan uzon de morsa kodo en la simbolo de ESF (Esperantic Studies Foundation), sed la kaŝita signifo en la logotipo de EAB estas eĉ pli obskura, kaj taŭgas por la muzeo pri ĉifroj kaj enigmoj en Poznań (kiun mi vizitis kaj rekomendas...)

Alia prelego kun tre interesa enhavo por mi estis de Michael Farris pri gestolingvoj ĝenerale (kun multaj informoj, kiujn mi antaŭe ne sciis), kaj specife pri la nuntempaj usona kaj la pola gestolingvoj, kaj la gestolingvo historie uzata ponte inter multaj indianaj triboj en Nordameriko.

Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

UEA eksigis la ĉefdelegiton en Rusio



La Estraro de UEA decidis “provizore ne renomumi ĉefdelegiton en Rusio”. Tio signifas, ke la nuna ĉefdelegito Svetlana Smetanina perdas sian postenon. Ŝi estis forte kritikata pro siaj komentoj pri la milito en Ukrainio.

La ĉefdelegito de UEA en Rusio devas esti eksigita, ĉar ŝi faris publikajn elpaŝojn pri la milito en Ukrainio neakcepteblajn por reprezentanto de UEA. Tion komence de aŭgusto postulis la tiama komitatano Osmo Buller.

La demando estis vigle diskutita dum la komitata kunsido de UEA en Montrealo, kie ĝin levis la komitatano A por Ukrainio, Jevhen (Eŭheno) Kovtonjuk. Post voĉdono la Komitato instrukiis la estraron “raporti pri la decido pri la eksigo de la ĉefdelegito de Rusio ĝis la 30-a de septembro”.

Post la decido prezidanto Duncan Charters atentigis, ke la komitata decido ne signifas, ke la Estraro nepre decidis pri eksigo de la rusia ĉefdelegito, aŭ entute decidis ion ajn pri la afero ĝis la fino de septembro.

– Ni prenos tion simple kiel respondecon raporti. Se ni devos daŭre trakti, ni traktos.

Osmo Buller siaflanke anoncis, ke li forlasos la asocion fine de aŭgusto. Poste Loes Demmendaal, la ĉefdelegito de UEA en Nederlando, anoncis, ke ŝi forlasos sian postenon, se UEA ne eksigos la rusian ĉefdelegiton ĝis la fino de septembro.

Post la komitata kunsido la Estraro de UEA laboris rapide, kaj jam la 30-an de aŭgusto ĝi publikigis raporton pri la revizio de ĉiuj ĉefdelegitoj. La ĉefa novaĵo en tiu raporto estas, ke la Estraro de UEA decidis provizore ne renomumi ĉefdelegiton en Rusio. Tio signifas, ke la nuna ĉefdelegito Svetlana Smetanina perdas sian postenon.

La motivado de la decido estas, ke “ĉiuj ĉefdelegitoj kiel ofichavantoj de UEA kaj reprezentantoj de la Asocio en siaj landoj devas atenti pri siaj eldiroj, ĉu publikaj, ĉu privataj, ĉar en ĉiu momento ili reprezentas UEA kaj iliaj eldiroj respektu la statutajn celojn, statutan neŭtralecon kaj statutajn difinojn de la Asocio.”

Laŭ la Estraro de UEA la komentoj de Smetanina subtene al militaj agoj ne konformas al la Statuto de UEA kaj damaĝas la publikan bildon de la asocio. Nova ĉefdelegito por Rusio ne povis esti nomumita, ĉar la landa asocio de UEA en Rusio, Rusia Esperantista Unio (REU), “indikis la nedeziron kunlabori kun alia ĉefdelegito”.

Tial, “pro la nuna malfacila politika situacio en Rusio”, la Estraro de UEA decidis provizore ne nomumi ĉefdelegiton en Rusio. La decido estis komunikita al la estraro de REU la 29an de aŭgusto.

Libera Folio petis komenton de Svetlana Smetanina kaj la prezidanto de REU, Aleksandr Lebedev. Lebedev ne tuj respondis. Osmo Buller respondis nur, ke li devas pristudi la raporton de la Estraro. Smetanina respondis:

– Ĉu vi ne hontas tion demandi al mi? La decidon de UEA komentu la Estraro de UEA.

Libera Folio (<https://mallonge.net/s1>)



Clay Magalhães: Ne plu KKS

La 28a de junio estis la lasta labortago de Clay Magalhães kiel la Konstanta Kongresa Sekretario de UEA (KKS). Clay naskiĝis en Foz do Iguaçu (Brazilo) la 2an de aŭgusto 1974, je la antaŭlasta tago de la memorinda 59a Universala Kongreso en Hamburgo. Li diplomiĝis pri turismo en la universitato UniOeste en la sama urbo en 1995.

Clay Magalhães fariĝis la plej longtempa KKS en la historio de UEA, ĉar li deĵoris en tiu posteno ekde 2003. Jam antaŭ tio, ekde 1999, li laboris kiel oficisto en la Kongresa Fakto de UEA kaj deĵoris en diversaj periodoj kiel volontulo en la sama fakto ekde 1996. En la maldekstra foto Clay aperas kiel volontulo en la libroservo de la Montpeliera UK en 1998 kune kun Cristina De Giorgi, Michela Lipari kaj Pasquale Zapelli (fotis Francisco Luis Veuthey). La dekstra foto estas farita en lia lasta labortago en lia laborĉambro en la Centra Oficejo (fotis Loes Demmendaal). Amaso da kongresantaj esperantistoj ekkonis lin kiel ĉiam afablan kaj helpeman oficiston de UEA.

Ni elkore dankas al Clay pro lia servado kaj deziras al li ĉion plej bonan en estonteco.

Osmo Buller

Transdono de la Arkivo de UEA al la Esperantomuzeo

En 2021 la Komitato de UEA akceptis la rekomendojn de la Estraro, Komisiono pri Financo kaj konsilantaj komisiitaj fakuloj, ke la Arkivo de UEA kaj neduoblaĵoj de la Biblioteko Hector Hodler, kiuj troviĝas en la Centra Oficejo (CO) en Roterdamo, estu transdonotaj al la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko (ANB) en Vieno. La CO ne havis fizikajn kondiĉojn tiajn, kiajn havas profesia institucio kiel ANB por la konservo de tiuj materialoj, nek disponas fakulojn por ilia katalogado kaj traktado.

En la unua semestro de 2022 UEA kaj ANB kompletigis la unuan etapon de tiu laboro, nome la unuan identigon kaj transporton de la materialoj de Roterdamo al Vieno. La transdono okazis surbaze de donackontrakto, kiu certigas la konservadon de la donitaĵoj fare de ANB por ĉiam kaj laŭ la internaciaj normoj adoptitaj por la administrado de palpeblaj moveblaj kulturaj heredaĵoj, kiel estis identigitaj la arkivo kaj ĉiuj donacitaj materialoj fare de UEA. Laŭ agnosko de ANB, la Arkivo de UEA estas “mondskale unu el la plej ampleksaj kaj gravaj arkivoj pri Esperanto kaj la internacia Esperanto-movado. [...] La UEA-arkivo elstaras per sia abundeco kaj diverseco. Ĝi enhavas arkivaĵojn same kiel ampleksajn kolektojn de afiŝoj, fotoj kaj aŭdvidaj dokumentoj. Tiel ĝi ebligas profundajn kultursciencajn kaj filologiajn esplorojn pri Esperanto”.

Unu el la celoj de la transdono ankaŭ estis tio, ke nun la materialo fariĝu pli strukture kaj profesie disponigata al esploristoj, kio ne povis rutine okazi en la CO pro manko de katalogo, strukturo kaj laborfortoj. Efektive la dua etapo de la laboro estas la finkatalogado kaj disponigo, inkluzive de ciferecaj kopioj, al la interesata publiko. Laŭ ANB “aldone al la ĉiutagaj taskoj la bibliotekistoj en la Esperantomuzeo kaj Kolekto por Planlingvoj nuntempe paŝon post paŝo alirebligas tiun valoran trezoron por la publiko. Unuaj dokumentoj jam estas katalogitaj kaj ciferecigitaj. Kvankam la arkivaĵoj estas ankoraŭ en la originaj skatoloj, kiuj dum la venontaj monatoj estos ŝanĝitaj per novaj senacidaj skatoloj, interesitoj kaj esploristoj jam nun povas peti inventarliston de la arkivo kaj mendi dokumentojn por studado en la legosalono de la Esperantomuzeo”.

“Inter la libroj estas la unuaj lernolibroj en la araba (Kairo 1904), greka (Samoso 1907) kaj kartvela (Tifliso 1909), kiuj bone montras, ke Esperanto jam antaŭ la unua mondmilito disvastiĝis ekster la pli grandaj Eŭropaj lingvo-komunumoj. La arkivo enhavas multnombrajn dokumentojn pri UEA kaj la Esperantomuzeo de ANB.

Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Tribuno



La monaĥejo de S-ta Triunuo en Tjumeno estis ŝatata loko por metropolito Filofeo Leŝĉinskij, ukraina pastro, kiu famiĝis kiel elstara aganto de la Rusortodoksa Eklezio, misiisto kaj kleriganto, protektanto de indiĝenaj triboj en Siberio. Ĉi tie, post longaj aventuroj kaj misteroj, preskaŭ tri jarcentojn post la morto Filofeo la Baptanto fine trovis sian azilon. Legu prian artikolon de Stanislav Belov. (Foto: Dmitrij Miŝkin)

Deklaracio de la 95a Kongreso de SAT

La 95-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazinta perinterrete de la 29-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2022

1. bedaŭras la kreskon de naciismo en multaj landoj, kiu elvokas internaciajn streĉojn, kondukantaj al militoj, kaj obstaklas la internacian kunlaboron necesan por kontraŭigi la ekologian degradiĝon de la planedo;

2. akre kondamnas la agresmiliton de Rusio, solidariĝas kun la homoj en Ukrainio, kiuj suferas, rezistas aŭ devas fuĝi, solidariĝas same kun la homoj en Rusio, kiuj suferas aŭ poziciigatas kaj elpaŝas kontraŭ la milito, kaj pro tio estas persekutataj, kaj solidariĝas kun la homoj, kiuj tutmonde poziciigatas kontraŭ militoj kaj subtenas rifuĝantojn;

3. ankaŭ akre kondamnas ĉiujn aliajn militojn kaj agresajn okupaciojn, kiuj samtempe estas okazantaj en la mondo, kiel interalie en Sirio, Jemeno, DR Kongo, Palestino, Okcidenta Saharo;

4. postulas en pli longa perspektivo, ke militoj ĉesu esti instrumento de politiko kaj de ekonomiaj interesoj, kaj, konsekvence, ke estu dissolvitaj ĉiuj militaliancoj, inkluzive de NATO; tiuj estu anstataŭigitaj per kolektivaj sekurecsistemoj, en kiuj ĉiuj koncernataj ŝtatoj partoprenu, kaj kies kerna celo estu malarmado;

5. ĉagrene konstatas, ke la pli ol 200 jarojn neŭtrala Svedio, en tiu senco modelo por aliaj landoj, kaj la pli ol 70 jarojn neŭtrala Finnlando, ĉesigis sian militneŭtralecon, aliĝante al milita bloko;

6. kondamnas persekutadon al tiuj kiuj okupiĝas pri informado dum milito ambaŭflanke aŭ pri aliaj aferoj kontraŭ ŝtataj interesoj kaj subtenas la laboron de ĵurnalistoj;

7. konstatas, ke kreskanta investado de pluraj ŝtatoj en militiloj kaj la plifortiĝo de militaj kaj ekonomiaj blokoj kontraŭas la interesojn de la laboristaro kaj estas minaco al la bonfarto de la popoloj;

8. apogas la defendon de indiĝenaj popoloj pri siaj teritorioj kaj rajtoj kontraŭ kapitalisma ekstraktado en Kanado, Usono, Brazilo, kaj aliaj landoj, kaj kondamnas la intensigon de energiekspektado pro la milito en Ukrainio;

9. protestas kontraŭ la 'jura milito' plenumata kontraŭ laboristoj, pacistoj ktp. en multaj landoj kun la foja komplaceco de plej reakciaj sektoroj de la justica maŝinaro;

10. solidaras kun la familianoj de la viktimoj de la akcidento en Seulo, kie tri laboristoj pereis dum inundo, kiuj plu batalas por ricevi decan kompenson de la respondecaj ŝtataj kaj kompaniaj instancoj, kaj postulas pli sekurajn laborkondiĉojn por ĉiuj laboristoj en la mondo;

Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Filofeo, ukraino kiu baptis Siberion

de Stanislav Belov



Siberio kaj Ukrainio ĉiam havis fortajn ligojn, speciale en la religia sfero. Ĉiuj metropolitoj de Siberio en la 18a jarcento venis el Ukrainio, kaj multaj akiris ĉi tie gloron, famon kaj eĉ sanktecon. La plej elstara kaj estimata estas Filofeo, kies vivo meritis esti prezentita en filmo aŭ romano.

Pastro kaj monaĥo

La estonta sanktulo naskiĝis en 1650 en Krolevec – urbeto, nun en Suma provinco, kiu tiam estis parto de la Zaporofja Armeo – loza militpolitika unio inter Ruslando kaj Pollando. Ni povas nur fari supozojn pri etna aparteno de Rafail Boguslavoviĉ Leŝĉinskij (pole: Rafał Leszczyński), kaj tio apenaŭ havas sencon en la regiono, kie poloj, ukrainoj kaj rusoj dum jarcentoj kunvivis miksite, kaj homoj ofte ne sciis etne identigi sin, nek interesiĝis pri tio.

Kiam la eta Rafail havis kvar jarojn, kozakoj, ribelintaj kontraŭ la Pollanda regado, petis helpo de la Ruslanda caro, subskribis respektivan traktaton, kaj Ukrainio aliĝis al Rusio. Cetere tio apenaŭ grave influis la vivon de la knabo. Iĝinte plenkreska, li elektis la karieron de ortodoksa pastro kaj sukcese direktiĝis al sia celo. Leŝĉinskij finis la Kievan Teologian Akademion, edziĝis kaj ekervis kiel paroĥa pastro.

Lian vivon draste ŝanĝis familia tragedio – lia edzino forpasis. En la ortodoksa eklezio ne ekzistas celibato kiel en la romkatolika, tamen la ortodoksa pastro same ne rajtas edziĝi – sed li devas esti edziĝinta. Ĉu paradokso? La klarigo estas simpla. Post la preparaj studoj pastrigonto devas edziĝi – nur post tio li ricevas paroĥon kaj konsekron. Se li pro iu ajn kialo restas sola (forpaso, divorco ks), li ne rajtas edziĝi denove, nek plu havi pastran rangon. En tiu kazo al li restas nur du vojoj: forlasi la eklezian karieron kaj iĝi laiko, aŭ monaĥiĝi.

Leŝĉinskij elektis la duan vojon – li estis agema kaj ambicia, kaj la monaĥiĝo

malfermis por li grandajn karierajn perspektivojn, ja en la Rusa Ortodoksa Eklezio nur monaĥoj rajtas okupi altajn postenojn. Li iris al la monaĥejo de la Grotoj en Kievo kie montris sin aktiva kaj fervora, do baldaŭ iĝis ĝia mastrumanto kaj ne forlasis tiun postenon eĉ post esti nomumita estro de la Svenska monaĥejo, tiutempe dependa de la Monaĥejo de la Grotoj (Kieva Kaverna monaĥejo). Li sendube farus bonan karieron en Kievo, sed lian vivon denove komplete ŝanĝis eksteraj fortoj – ĉi-foje la Ruslanda ŝtato.

Metropolito

Tiutempe estiĝis bezono pri efika administrado de la Siberia eparĥio, fondita en 1620. Siberio estis ankoraŭ nova regiono por Ruslando – la unua urbo Tjumeno estis fondita en 1586, la Siberia ĉefurbo Tobolsko aperis en 1587. Malmultaj rusaj setlintoj loĝis dise en grandega teritorio, loĝata de pluroble pli multaj indiĝenoj – tataroj, ĥantoj, mansoj, nenecoj. Preĝejoj malmultis same kiel la pastroj, kaj religia piemo estis rara afero. Rusaj siberianoj ofte rompis bazajn regulojn de la kristana vivo kaj aktive transprenis tradiciojn kaj vivkutimojn de siaj indiĝenaj najbaroj. Resume, la eklezio havis tie multe da laboro farenda kaj malmulte da laborantoj.

Fine de majo 1700 metropolito Ignaco (Rimskij-Korsakov) forlasis Tobolskon pro malsaniĝo. En marto 1701 la postenon okupis Demetro (Tuptalo), kiun al Petro la Granda rekomendis metropolito de Kievo Varlamo (Jasinskij). Same kiel Leŝĉinskij, li finis la Kievan Teologian Akademion kaj monaĥiĝis en la Monaĥejo de la Grotoj en Kievo.

Sed Demetrio rifuzis translokiĝi al Siberio pretekste de sia malforta sano kaj gvidis la eparĥion el Moskvo, kio apenaŭ povus esti efika afero, konsiderante ke tiutempe mesaĝo de Tobolsko al Moskvo veturis unu monaton. En januaro 1702 li estis nomumita metropolito de Rostovo kaj Jaroslavo, dum la siberian postenon okupis alia ukraino – nia heroo el Krolevec, kiun li konis pro ilia komuna vivo en la Kieva monaĥejo.

Tobolsko



La 4an de aprilo 1702 Leŝĉinskij, konsekrita je episkopa rango sub la nomo Filofeo, venis al Tobolsko akompanata de kelkaj asistantoj el Kievaj monaĥoj. La situacio en la Siberia eparĥio estis sufiĉe plorinda – la pastroj estis malriĉaj kaj nesufiĉe edukitaj, la episkopa ĉefsidejo forbrulis en junio 1701, preĝejoj estis neglektataj. Sed por Leŝĉinskij tiu dezerto prezentiĝis kiel plugenda kampo, do ĝi estigis ne desperon, sed entuziasmon.

En 1703 li malfermis en Tobolsko teologian lernejon. Laŭ lia iniciato la ŝtato donacis al monaĥejoj kaj preĝejoj plurajn terenojn kaj falĉejojn. La pastroj komencis ricevi salajrojn pagatajn de paroĥanoj. Komenciĝis aktiva konstruado de preĝejoj, kies nombro en Siberio dum lia regado kreskis de 160 ĝis 448.

Aktiviĝis la misiismo inter siberiaj indiĝenoj, antaŭe bremsata de la registaro, ĉar laŭleĝe indiĝenoj konvertitaj al kristanismo ne plu pagis “jasakon” – indiĝenan imposton forme de peltoj. En 1703 li sukcesis nuligi tiun regulon, do komenciĝis aktiva baptado de ĥantoj, mansoj kaj nenecoj. En 1704 Filofeo sendis misiistojn al Mongolio kaj Ĉinio, kaj li mem navigis al Berjozovo por admoni lokajn ĥantojn akcepti kristanisman. En 1705 li sendis misiistan ekspedicion al Kamĉatko sub la gvido de arkimandrito Adriano. En 1706 la guberniestro Matvej Gagarin petis lin aktivigi tiun laboron, kaj Filofeo sendis misiistojn al Berjozova kaj Surguta distriktoj.

Ĉiuj ĉi zorgoj kaj klopodoj kune kun severa Siberia klimato, grave elĉerpis la fortojn de la agema ukraino – Filofeo malsaniĝis. La 12an de septembro 1709 li akceptis asketan monaĥiĝon kaj foriris al la monaĥejo de Sankta Triunuo en Tjumeno sub la nomo Teodoro. Tiu ĉi monaĥejo estis fondita en 1616 kiel la kvara en Siberio, ĝi estis loko kiun li tutkore amis kaj plibeligis laŭeble. Malgraŭ la totala malpermeso de la ŝtona konstruado en la imperio (ĉiuj ŝtonresursoj iris al konstruado de la nova ĉefurbo Sankt-Peterburgo), Filofeo sukcesis ricevi permeson de la imperiestro, kiu ne povis rifuzi la peton de sia Siberia kunlaboranto.

En tiu monaĥejo ĉio memorigis al li la amatan Ukrainion. En la Triunua preĝejo troviĝis altaroj omaĝe al la Endormiĝo de Maria kaj al la sanktaj monaĥoj Antonio kaj Teodozio el Kievo – ambaŭ historie ligitaj al la Monaĥejo de la Grotoj de Kievo. La arkitekturo de la preĝejo de Petro kaj Paŭlo havas klare ukrainajn radikojn, kaj arkitektoj diskutas nur pri kiun ekzemplon ĝi sekvis, sed ili ne dubas, ke la monaĥejon grandparte konstruis ukrainaj metiistoj, inviritaj de Filofeo.

Fakte ĉiuj preĝejoj de la Tjumena monaĥejo estis ekkonstruitaj dum lia regado kaj danke al liaj senlacaj klopodoj. Tamen li apenaŭ imagis kiom gravan rolon tiu ĉi klostro ludos en lia sorto eĉ post lia morto.

Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Antaŭ 45 jaroj, la 1-10an de aŭgusto 1977, ĉe la pitoreska Urala lago Turgojak (Ĉeljabinska regiono, proksime de la urbo Miass) okazis la unua Orient-Sovetia esperantista junulara tendaro OrSEJT-19. Kial ĝi estis laŭnumere ne la unua, sed la 19a, vi povas legi en la paĝoj 76-77. (Foto: Vladimir Grebenjuk)

Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2022

1. Antaŭ 135 jaroj naskiĝis **Hector Hodler** (1887-1903-1920), svisa esperantisto, kunfondinto kaj kunredaktoro (kun E. Privat) de *Juna Esperantisto* (1903), redaktoro de la revuo *Esperanto* (1907-20) aĉetita en 1906 ĉe P. Berthelot; kuniniciatoro (1908), vicprezidanto (1908-11), direktoro (1911-19) kaj prezidanto (1919-20) de UEA, la ĉefa ideologo de UEA, aŭtoro de multaj artikoloj kaj kelkaj broŝuroj pri Esperanto; Hodler testamentis grandan monsumon, la revuon *Esperanto* kaj sian bibliotekon al UEA, kies biblioteko plu havas lian nomon.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 128-129).

4. Antaŭ 90 jaroj forpasis **Pál Lengyel** (pron.: léndel, 1868-1898-1932), hungara presisto kaj esperantisto, teknika redaktoro de Presa Esperantista Societo en Parizo (1905-14), eldonanto de *Lingvo Internacia* (1899-1904), redaktoro de *Juna Esperantisto* (1909-14), redakciano de *Literatura Mondo* en ties unua eldonperiodo (1922-26), membro de la Lingva Komitato ekde ties fondo (LK, 1905) ĝis sia morto (1932), membro de la Akademio de Esperanto (AdE, 1910-28), honora prezidanto (1924-32) de Hungarlanda Esperanto-Societo, aŭtoro de *Libro de l' humoraĵo* (1899, bitlibro 2002) k. a.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 174-175).

4. Antaŭ 55 jaroj forpasis **Hans Jakob** (1891-1905-1967), germana librotentisto kaj esperantisto, svislanda civitano; dum 1912-34 oficisto en CO de UEA en Svislando en diversaj oficoj, direktoro de UEA (1920-34), redaktoro de la Jarlibro de UEA (1922-34); en 1934 forlasis la aktivadon en UEA proteste kontraŭ la ne-reelektado de E. Privat en la komitaton de UEA, sed post la skismo de UEA (1936) revenis kiel administranto de UEA en Ĝenevo; estrarano de la "Ĝeneva" UEA (1939-47) kaj de la reunuigita UEA (1947-55), komitatano de la reunuigita UEA (1947-61); redaktoro de *Esperanto* (1936-55), aŭtoro de *Universala Esperanto-Asocio 1908-1933: Historia skizo* (1934) kaj *Servisto de l' ideo: 50 jaroj ĉe Universala Esperanto-Asocio, 1908-1958* (verkita en 1958, eldonita en 1995).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 141-142).

10. Antaŭ 105 jaroj naskiĝis **Ralph Lindsay Harry** (1917-1937-2002), aŭstralia diplomato, direktoro de la aŭstralia sekretservo ASIS (1957-60), verkisto kaj esperantisto; prezidanto de Aŭstralia Esperanto-Asocio (1960-61, 1986-88), vicprezidanto de la jurista asocio IEAJ (1979-87); aŭtoro de *Esperanto: lingvo de la sporto* (1972), *Aŭstralia-Esperanta vortaro* (kun V. Gueltling, 1983), *Briĝo: 5-lingva terminaro* (1985), *Aventuroj en Esperantujo* (1994; *Adventures in Esperantoland*, 2001.), *La diplomato kiu ridis* (1997) k. a.; tradukinto de *La ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj* (1952) kaj de aliaj oficialaj dokumentoj de UN; membro de la Honora Patrona Komitato de UEA (1967), laŭreato de la premio Deguĉi (1988).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 125-126) kaj en la artikolo

Ralph Harry naskiĝis antaŭ cent jaroj de Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov: <https://sezonoj.ru/2017/10/harry>.

15. Antaŭ 85 jaroj pro partopreno en la agado de kontraŭrevolucia trockiista esperantista organizaĵo SEU estis pafekzekutita **Jevgenij Iosifoviĉ Miĥalskij** (Михальский, 1897-1911-1937), sovetunia bibliotekisto, instruisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel Eŭgeno Miĥalski; kunfondinto (1931) kaj estrarano de Internacia Asocio de Revoluciaj Esperantaj Verkistoj, membro de LK (1932-37), talenta poeto, aŭtoro de la poemaroj *La Unua Ondo* (1918), *Du Poemoj* (1922), *Prologo* (1929), *Fajro kuracas* (1932) kaj *Kantoj de amo kaj sopiro* (1934); kuntradukinto de la fantazia romano *Ruĝa Stelo* de A. Bogdanov (1929); en 1994 aperis lia *Plena poemaro*, kompilita de W. Auld.

• Legu pli en la artikolo *Eŭgeno Miĥalski* de Nikolao Gudskov <https://sezonoj.ru/2012/05/211trezor/>

16. Antaŭ 65 jaroj naskiĝis **Katalin Kováts** (pron.: kóvaĉ, 1957-1976-), hungara instruistino kaj esperantistino ekde 2001 loĝanta en Nederlando; gvidantino de diversnivelaj kursoj, seminarioj kaj trejnadaj en trideko da landoj; fondinto (2001) kaj ĝisnuna redaktoro de la porinstruista retejo edukado.net, iniciatoro de la enkonduko de Esperanto en la ekzamenon laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) kaj organizanto de KER-ekzamenoj, gvidanto de la reta trejnado RITE kaj de la reta ludo "Risiko"; aŭtoro de *Ĉu vi aŭdis, ke...?* (1993), *Poŝamiko* (kun B. Allée, 2006), *Stelsemantoj en la ora nordo* (2011); redaktoro de *Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh* (1995) kaj *Manlibro pri instruado de Esperanto* (2005); membro de AdE ekde 2007; laŭreato de la premioj Ada Sikorska (2009) kaj Esperanto-Kulturpremio de la urbo Aalen kaj FAME-Fondaĵo (2016), laŭreato de la titolo la Esperantisto de la Jaro 2010.

• Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 161-162).


23. Antaŭ 50 jaroj forpasis **Gabriel Chavet** (pron.: ŝavé, 1880-1896-1972), franca juristo, poŝtoficeisto, administranto, pacifisto kaj esperantisto; propagandisto kaj instruisto de Esperanto, kunfondinto de Pariza Grupo Esperantista (1900), ĝia sekretario kaj kasisto ĝis 1903; sekretario de Esperantista Centra Oficejo en Parizo ekde ĝia fondo (1905-24), Ĝenerala Sekretario de la [Universalaj] Kongresoj (1909-25), kuniniciatinto de ICK kiel tegmenta instanco por UEA kaj landaj asocioj (1922) kaj membro de la sespersona ICK (1922-24); kunfondinto de la eldonejo-vendejo *Librairie de l' Espéranto* (kun G. Warnier, 1906), redaktoro de *Oficiala Gazeto Esperantista* (kun H. Sebert, 1908-22)

Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



Maksim Gorjkij estas la tria aŭtoro, prezentata en nia projekto “Rusa Novelaro 2”, en kiu aperas mallongaj prozaĵoj de rusaj aŭtoroj de la 20a jarcento. (Pentraĵo de Isaak Brodskij, 1939)

Maksimume amara vivo

Oni rakontas, ke foje en bankedo, aranĝita honore al Maksim Gorjkij post ties definitiva reveno al Sovetunio, Karl Radek* tostis: “Ni donis la nomon Maksim Gorjkij al parkoj, stratoj, kolĥozoj... Mi proponas nomi nian tutan vivon Maksimume Amara”. Ĉi tiun vortludon ne tuj komprenas tiuj, kiuj ne konas la rusan lingvon, sed “**Maksimaljno Gorjkij**” ja estas nenio alia ol maksimume amara.

Efektive, en lia vivo ne mankis amaro. Aleksej Maksimoviĉ Peŝkov naskiĝis la 16an (Gregorie: la 28an) de marto 1868 en la Volga urbo Niĵnij Novgorod, en la familio de lignaĵisto kaj ŝipkompania oficisto Maksim Peŝkov. En 1871 la trijara etulo Aljoŝa malsaniĝis je ĥolero kaj kontaĝis sian patron; la patro mortis, sed la filo sukcesis elvivi. La patrino duafoje edziniĝis, kaj ŝia nova edzo neamike rilatis al sia duonfilo. Post vica skandalo Aleksej forlasis la patrinon (ŝi mortis en 1879) kaj ekloĝis ĉe la gepatroj de sia patro.

Kiel 11-jarulo, li komencis labori kiel helpbutikisto, telerlavisto, bakisto ktp. Trifoje li eklernis en lernejo, sed ne kompletigis sian lernadon, kaj la vivon li lernis, petolante kaj ŝteletante kun siaj samsortanoj-stratbuboj. Tamen li lernis legi kaj legis multe, kaj tute ne tion, kion oni devis legi laŭ la lerneja programo.

En la 16-jara aĝo Peŝkov venis al Kazano, kaj tie li konatiĝis kun junaj socialistoj. Sekvis arestoj, nesukcesa suicido, hazardaj laboroj kaj multaj vojaĝoj, sur kies bazo li poste verkis sian membiografian trilogion *Infanaĝo*, *Inter la homoj*, *Miaj universitatoj* kaj la kolekton *Tra Ruslando*.

Sed komence siajn amarajn spertojn Peŝkov rakontis al hazardaj kunuloj. Unu el ili, socialisto en Tifliso (nun: Tbilisi), persvadis lin surpaperigi almenaŭ unu rakonton kaj, ricevinte la tekston, li helpis aperigi ĝin la 12an de septembro 1892 en la tagĵurnalo *Kaŭkazo* sub la titolo *Makar Ĉudra*. Ĉi tiun rakonton pri amara sorto cigana Peŝkov subskribis “M. Gorjkij”. Sekvis pliaj verk(et)oj, kaj en 1895 pro konsilo de Korolenko li profesiigis kiel ĵurnalisto en Samaro.

La daŭrigon oni bone scias: rakontoj, noveloj, romanoj, dramoj, honora akademi-aneco nuligita de la registaro, famo kaj mono, edzinoj kaj amikinoj, eldonejoj kaj gazetoj, financado de bolŝevistoj, eksterlando kaj Ruslando, milito kaj revolucio...

La bolŝevista revolucio kreis ne la idealan homon, kion aspiris Gorjkij, sed internan militon, teroron, malsaton, cenzuron kaj fermon de la libera gazetaro, inkluzive de lia *Novaja ĵiznj* (La Nova Vivo), en kiu li aperigis siajn “Neĝustatempajn pensojn”. Post kvereloj kun Lenin, kaj, precipe, post la pafekzekuto de Nikolaj Gumiljov, Gorjkij en oktobro 1921 forlasis Ruslandon, sed ne la ruslingvan verkadon. Kurioze,

la “Granda Proleta Verkisto”, kiun oni ofte nomas ankaŭ “La Fondinto de Socialisma Realismo” reale verkis preskaŭ nenion, kio konformus al la difino de sorealismo, sed ĉu tio gravas? Tute ne, legu la rakonton pri la vojqvidisto Petro, kiun oni spite al ĉio konsideris la plej bona konanto de la arbaro.

Post la ĉeso de la “milita komunismo” kaj pro la provizora mildiĝo de la reĝimo meze kaj fine de la 1920aj jaroj, Gorjkij ekde 1928 komencis viziti Sovetunion kaj triumfe revenis definitive en aŭtuno 1932, kiam en Sovetunio estis vaste festata la 40-jariĝo de lia literatura agado.

Karl Radek povintus daŭrigi sian toston, ja la nomon Gorjkij ricevis ankaŭ la tria plej grava Ruslanda urbo (post Moskvo kaj Peterburgo, jam renomita Leningrado) Niĵnij Novgorod, la teatro MĤAT, la baldaŭ fondita Literatura Instituto, fabrikoj, uzinoj, lernejoj, ŝipoj, aviadiloj... Li ricevis donace la ordenon Lenin, palaceton en la centro de Moskvo, someran vilaon apud Moskvo, vintran vilaon en Krimeo, kaj la publikan admiradon de la samlandanoj.

Tamen la amaro restis en lia vivo. Ekzemple, Gorjkij ne ricevis la Nobelpremion, al kiu li estis plurfoje kandidatigita, kaj kiun li atendis en Italio, sciante, ke la Nobelkomitato en la 1930aj devos asigni ĝin al Ruslanda elmigrinto. Kaj tiel okazis. La premion kaj la gloron ricevis *pli vera* elmigrinto ol Gorjkij – Ivan Bunin. La amaro restis ankaŭ en liaj verkoj, kiuj en Sovetunio plu aperis en fantastaj eldonkvantoj.

La vivo de Maksim Gorjkij ĉesis la 18an de junio 1936, unu jaron antaŭ la komenco de la “maksimume amara vivo” en Sovetunio – la Granda Purigo, inter kies viktimoj, ekzekutitaj aŭ malliberigitaj, estis pluraj membroj de la Verkista Unio de USSR, gvidita de Gorjkij ekde ĝia fondo en 1934.

Por la tria publikigo en *Rusa Novelaro* ni elektis kvar rakontojn de Gorjkij, en kiuj kunvivis amaro, tenero kaj humuro.

Aleksander Korĵenkov

Noto

* **Radek, Karl** (Karol Sobelsohn, 1885-1939). Revoluciulo, diplomato, sekretario de la Plenumkomitato de Komunista Internacio, estro de la fako de CK VKP(b) pri internacia informado, brila ĵurnalisto kaj literaturisto, cinikulo, provokisto kaj la ĉefa aŭtoro de prijudaj (li mem estis judo) kaj kontraŭkomunismaj anekdotoj en USSR.

Rusa Novelaro 2

Ivan Bunin. En bieneto; Facila spirado; Sunfrapo; En Parizo; “Madrida” (Tr. A. Korĵenkov). *La Ondo de Esperanto*, 2022, N°1.

Aleksandr Kuprin. Siringo. Viando. Helenjo. Nokta violo (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova). *La Ondo de Esperanto*, 2022, N°2.

Maksim Gorjkij. Foje en aŭtuno; La naskiĝo de homo; Helgriza kaj lazura; La gvidisto (Tr. V. Jurganov, A. Korĵenkov, L. Novikova). *La Ondo de Esperanto*, 2022, N°3.

Maksim Gorjkij

FOJE EN AŬTUNO

... Foje en aŭtuno mi trovis min en tre malagrabra kaj ĝena situacio; en la urbo, kien mi ĵus venis kaj kie mi havis neniun konatan homon, mi estis sen groŝo en la poŝo kaj sen loĝejo.

Vendinte en la unuaj tagoj ĉiujn miajn vestaĵojn, sen kiuj mi povus vivi, mi foriris el la urbo al la loko, nomata Ustje[1], kie estis albordiĝejoj por ŝipoj, kaj kie dum la navigada tempo bolis vigla laborplena vivo, sed nun tie estis senhome kaj kviete — tio okazis dum lastaj tagoj de oktobro.

Irante nudpiede sur humida sablo kaj atente rigardante ĝin kun la deziro trovi sur ĝi restaĵojn de iuj manĝeblaĵoj, mi solece vagadis inter senhomaj domoj kaj varbudoj, kaj pensis pri tio, kiel bonas esti sata.

Ĉe la nuna stato de kulturo la malsaton de la animo oni povas kontentigi pli facile ol la malsaton de l' korpo. Vi vagadas sur stratoj, vin ĉirkaŭas domoj, ne malbelaj ekstere kaj — oni povas senerare diri tion — ne malbele meblitaj interne: tio povas vekti en vi agrablajn pensojn pri arkitekturo, pri higieno kaj ankoraŭ pri multo alia, saĝega kaj alta; renkonte al vi iras komforte kaj varme vestitaj homoj, — ili estas ĝentilaj, ili ĉiam forflankiĝas de vi, delikate ne dezirante rimarki la tristan fakton de via ekzistado. Je Dio, la animo de la malsata homo ĉiam estas nutrata pli bone kaj pli sane ol la animo de la sata, — jen la situacio, el kiu oni povas tiri tre spritan konkludon favore al la sataj!..

... Vesperiĝis, pluvis, de nordo blovis impeta vento. Ĝi fajfis en malplenaj budoj kaj butiketoj, frapis la hotelajn fenestrojn, fermitajn per alnajlitaj tabuloj, kaj pro la battoj de l' vento la riveraj ondoj ŝaŭmis, brue plaŭdis sur la sablon de l' bordo, alte svingante siajn blankajn krestojn, unu post alia kuregis al la malklara foro, rapide saltante unu trans alian... Ŝajnis, ke la rivero sentis la proksimiĝon de la vintro kaj timigite fuĝis ien de la glaciaj katenoj, kiujn tiunokte la norda vento povus ĵeti sur ĝin. La ĉielo estis peza kaj morna, de ĝi senĉese ŝutiĝis apenaŭ videblaj pluveretoj. La tristan elegion en la naturo ĉirkaŭ mi emfazis du kriplaj salikoj kun rompigitaj branĉoj kaj renversita boato ĉe iliaj radikoj.

La renversita boato kun trarompita fundo kaj la mizeraj kaj kadukaj arboj, prirabitaj de la frida vento... Ĉio ĉirkaŭe estis detruita, malfekunda kaj morta, kaj la ĉielo verŝadis siajn neelĉerpeblajn larmojn. Ĉirkaŭe estis dezerte kaj sombre — ŝajnis, ke ĉio estis mortanta, kaj ke baldaŭ restos viva nur mi, sed ankaŭ min atendos malvarma morto.

Sed tiam mi havis dek sep jarojn — bona aĝo!

Mi longe paŝadis sur malvarma kaj humida sablo, dentoklakante trilojn honore al la malsato kaj frosto, kaj subite, en mia vana serĉado de io manĝebla, turninte min post angulo de unu el la budoj, mi ekvidis, ke sur la tero post ĝi kaŭras figuro en virina robo, malseka pro la pluvo kaj fikse gluiĝinta al la kliniĝintaj ŝultroj. Senmoviĝinte super ŝi, mi atente rigardis, kion ŝi faris. Evidentiĝis, ke ŝi estis fosanta per siaj manoj truon en la sablo sub unu el la budoj.

— Por kio vi faras tion? — mi demandis, kaŭrante apud ŝi.

Ŝi mallaŭte krietis kaj stariĝis per rapida salto. Nun, kiam ŝi staris kaj rigardis al mi per siaj vaste malfermitaj grizaj okuloj, plenaj de timo, — mi vidis, ke ŝi estas junulino de mia aĝo, kun tre ĉarma vizaĝo, bedaŭrinde, ornamita per tri grandaj bluaĵoj. Tio difektis la vizaĝon, kvankam la bluaĵoj lokiĝis sur ĝi kun mirinda proporcieco — po unu egale granda sub ĉiu okulo, kaj unu pli granda sur la frunto, ĝuste super la nazradiko. En ĉi tiu simetrio estis videbla laboro de artisto, tre rafinita en la metio de l' difektado de la homaj fizionomioj.

La junulino rigardis al mi, kaj la timo en ŝiaj okuloj iom post iom estingiĝis. Jen ŝi forskuis la sablon de siaj manoj, ordigis la indienan tukon sur sia kapo, skuetiĝis kaj diris:

— Verŝajne, ankaŭ vi deziras manĝi?.. Do, fosu, miaj manoj laciĝis. Tie, — ŝi gestis per sia kapo al la budo, — verŝajne, estas pano... Ĉi budo ankoraŭ funkcias...

Mi komencis fosi. Ŝi iom atendis kaj, ĵetinte al mi sian rigardon, sidiĝis apude kaj komencis helpi min...

Ni laboris silente. Nun mi ne povas diri, ĉu tiutempe mi memoris pri la kriminala kodo, pri la moralo, proprieto kaj pri ceteraj temoj, pri kiuj, laŭ la opinio de kompetentuloj, oni devas pensi dum ĉiuj momentoj de la vivo. Dezirante esti laŭeble plej proksime al la vero, mi devas konfesi, ke mi, ŝajne, estis tiel profundiĝinta en la afero de la fosado sub la budo, ke mi absolute forgesis pri ĉio, escepte de tio, kio povus troviĝi en ĉi tiu budo...

Vesperiĝis. La mallumo — humida, trapenetranta, frosta — iĝis ĉiam pli densa ĉirkaŭ ni. La ondoj bruis ŝajne pli obtuze ol antaŭe, kaj la pluvo tamburis sur la tabuloj de la budo pli sonore kaj pli ofte... Ie jam malagrabla eksonis klakilo de nokta gardisto.

— Ĉu ĝi havas plankon, aŭ ne? — mallaŭte demandis mia helpantino. Mi ne komprenis, pri kio ŝi parolas, kaj restis silenta.


Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Dankon, dankon...

de Paulo Sergio Viana



Antaŭ du tagoj mi trapasis komplikan operacion je mia maldekstra okulo. Se konsideri, ke mi estas 70-jarulo, kiu vivas fraŭle, sub la zorgoj de la 75-jara surda fratino, kaj se konsideri, ke ankaŭ mia dekstra okulo apenaŭ kaptas bildojn el la ekstera mondo, tiam oni povas imagi mian situacion de kaptito. Kaptito en siaj propraj pensoj. Feliĉe, mi ne estas ankoraŭ blinda antaŭ miaj internaj scenoj.

Mia fratino informis al mi jam frumatene, ke hodiaŭ estas bluĉiela, lumplena, hela dimanĉo. Mi ĵus vekigis kaj ektrinkis la kafon de ŝi preparitan, kaj por nia ambaŭa surprizo la sonorilo ektintis. Sufiĉe frue, por dimanĉo! Kiu estas la frumatena vizitanto?

Tiu estis mia najbaro Marcelo. Bona homo. Iom senpripensa, sed bonulo, ja... Li ne sukcesas pensi, ke la sepa horo matene estas iom tro frua horo por najbara vizito, sed ne gravas, li trinkos kafon kun mi. Krome, mi scivolas: kio venigas lin al dimanĉa vizito al ĵusoperaciito?

– Saluton, kara najbaro! Kiel vi fartas? Mi eksciis, ke vi trapasis operacion! Kia teruraĵo! Vidi nenion, havi sur la okulo tian pezan pansaĵon! Horore! Ĉu ĝi doloras vin? Ĉu vi sukcesas paŝi en la domo? Bani vin? Manĝi? Trinki? Spekti televidon? Kompreneble ne televidon, sed almenaŭ aŭdi radion? Muzikon? Ĉu vi ŝatas muzikon? Kiaspecan muzikon? Mi povus pruntedoni al vi mian “Spotify”! Estas en ĝi ĉiaspeca muziko, por ĉia gusto. Hieraŭ mi aŭdis belegan kamparan muzikon! Se vi emas...

– Dankon, dankon...

Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Vivi

de Laure Patas d'Illiers



Vi elglitas el la dika varmo kiu ĉirkaŭe premis. Ekstere. Senfino trablovata de glaciaj ventoj. Kruela lumo. Viaj okuloj kunpremiĝas. Voĉo ŝrikanta pro timo. Ŝajnas ke ĝi eliras el nenie. Tamen via ĝi estas.

* * *

Vi paŝas sur strato. Via mano premas tiun de via panjo. La aŭtuna mateno oblikve lumigas la trunkojn de la ĉevalkaŝtanoj. Viaj ŝuoj krakigas la velkajn foliojn sur la trotuaro. Pro la pezo de via tornistro viaj ŝultroj iomete kurbigigas. Hieraŭ vi flaris ene de la tornistro. Odoris je nova papero kaj ligno de kolorkrajonoj. Hodiaŭ unuafoje vi eniros misteran ejon. Laŭdire tien vi iros ĉiutage, dum jaroj kaj jaroj. En la aero ŝvebas vaporo de nekonata estonto. La paŝoj de via panjo pli longas ol la viaj. Foje vi bezonas kureti. Vi preferus malrapidi, por ke la irado pli longe daŭru.

* * *


Vi faros tion. Ĉi-nokte. Ekde pluraj semajnoj vi ambaŭ parolas pri tio. Vi deziras tion. Tamen vi ne scias ĉu... Ĉu vi estas preta por tio? Ĉu tio bone okazos? Ĉu tio finfine plaĉos al vi? Ĉu... Vi perdiĝas en tiom da "Ĉu". En via menso, turniĝas paroloj. La fanfaronaj rimarkoj de viaj amikinoj, kiuj jam faris tion. La praktikaj informoj diskrete menciitaj de via patrino. Vi paŝas al la rendevuo. En via poŝo, vi fingrumas saketon da kondomoj. Vi aĉetis ilin, okaze de tio, se li forgesus alporti iom da. Vi memoras liajn hieraŭajn kisojn. Via koro rapidiĝas, viaj okuloj fermiĝas kaj vakuo kriiĝas en via ventro. Vi sentas vin viva, ekzaltita. Morgaŭ vi estos alia!

Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Hispana poeto super poetoj: *Juan Ramón Jiménez*



Juan Ramón Jiménez

de Miguel Fernández

Juan Ramón Jiménez (1881-1958), andaluzo de la provinco Huelva, ĝuste de la urbo Moguer, estis unu el la grandaj majstroj de la hispana poezio. En 1956 li ricevis la Nobel-premion pri literaturo. Eble la plej populara el liaj verkoj en Hispanlingvio estas *Platero y yo* [Platero kaj mi], superba modelo de lirika prozaĵo en la hispana lingvo, legebla en Esperanto dank' al traduko far Liven Dek aperinta en 2009 kiel №9 de la kolekto *Hispana Literaturo* de HEF.

Dum sia tuta vivo Jiménez submetis sian poezion al eksterordinara procezo de elpurigo, el kiu rezultis poezia esencismo kun granda influo sur la junajn poetojn aliĝintajn al la skolo t.n. "pura poezio". En poemo de sia poemaro *Eternidades* (Eternecoj), la poeto mem jene (en mia esperantigo) priskribas verse la avatarojn de sia poezio:

*Ĝi ekaperis pura,
vestita per naivo.
Kaj ĝin mi bube amis.*

*Ĝi poste sin vestadis
per stranga kostumaro,
kaj mi malamis ĝin preterkonscie.*

*Ĝi iĝis tuj reĝino
en pompa trezor-pleno...
Kia kolero gala kaj sensenca!*

*... Sed ĝi sin senvestigis,
kaj mi al ĝi ridetis.*

*Restis al ĝi l' tuniko
de ĝia pranaivo.
Al ĝi mi kredis ree.*

*Kaj ĝi sentunikiĝis
kaj jen aperis nuda tute, plene...
Ho, viv-pasio mia, poezio
finfine nuda, mia porĉiame!*

Nun, surbaze de la analizoj far Fernando Lázaro kaj Vicente Tusón en la libro *Literatura Española* [Hispana Literaturo], mi iom pritraktos ĉiun el tiuj aspektoj de la Jimenéz'a poezio kaj ilustros ilin per priaj de mi esperantigitaj poemoj.

LA POEZIO “VESTITA PER NAIVO”:

En la libro *Arias tristes* [Tristaj arioj] (1903), kune kun la unuaj spuroj de la Modernismo (vidu mian eseon pri tiu interkontinenta – hispan-amerikana kaj hispana – skolo en *La Ondo de Esperanto* (2020, №4), aperis poemoj reprezentaj de la unua etapo de Juan Ramón. Tiele, en la ĉi-sekva. Temas pri fajne stiligita vilaĝ-bildo. La rimon en la paraj versoj li anstataŭigas per simpla vokalrimo (a-o), la ornamaĵoj minimumas. Male, la emocio de la poeto – lia tristo, lia solo – ĉion kovras:

*Tra l' vualo de la pluvo
griziganta la pejzaĝon,
jen revenas la bovinoj
el la dolĉo de la valo.*

*Sonas tristaj tintilegoj
malproksimaj, kaj en falo
la vespero ade tristas
sen stel-briloj kaj sen kantoj.*

*La kamparo jame restas
frida, sola kun la arboj;
hodiaŭe nul revenos
sur la fore distaj padoj.*

*Tuj mi fermos la fenestron,
ĉar, se perdos mi ĉe l' valo
mian koron, eble volos
morti ĝi kun la pejzaĝo.*

Iĝu patrono de “La Ondo de Esperanto”!

LA “STRANGA KOSTUMARO” DE LA MODERNISMO:

Jena poemo el *La soledad sonora* [La sonora solo] (1911) bone ekzemplas la novan etapon “en pompa trezor-pleno”. En ĝi, la poeto uzas aleksandrajn alternarimajn kvarversojn, nome strofon tipan ĉe la Modernismo. La “eterna nostalgio” aŭ la “svaga tristo” esprimiĝas nun per tre rafinita lingvaĵo, plenplena de sensaj notoj. Absolutas en ĝi la impresoj pri belo. Rimarkindas, ke la uzitan leksikon eblas grupigi ĉirkaŭ du polusojn: melankolian triston kaj delikatan belon:

*Venas parfumo trista el jasmengar' lun-stria
kaj fora muzik-ploro en romantika pleno...
Descendas el la steloj, afliktodrone, ia
brizo kun la koloroj novaj de la mateno...*

*Jen, en fantoma flavo, dolor' kaj bon-odoro,
mi erarvagas tra l' avenua nebuleco,
velka de l' harmonio, rompita de la foro,
morta inter rozujoj palaj de la forgeso.*

*La luno per tepido arĝentas plu la frondojn,
kiam la tag', jam roza, inundas ĉe l' ĝardenoj
ĉi mian svagan triston per siaj fajraj ondoj,
per ploro, per muziko, per brizo kaj jasmenoj...*

ALE AL NOVA POEZIO:

La poezio “sin senvestigis”. La komenco de tiu procezo de elpurigo observeblas en la sekva poem-paro. La unua, *Flava printempo*, apartenas al *Poemas mágicos y dolientes* [Poemoj magiaj kaj doloraj] (1911) kaj ankoraŭ sidas ene de la Modernisma etapo. Efektive, la marko de la Modernismo palpeblas ankoraŭ en tiu brila bildigo de la printempo. Sed la poeto realigas en ĝi genian reduktion de la koloroj (aperas unu sola tono, obsede ripetata). Ĝia metriko pli simplas. Denove la paraj versoj estas nur vokalrimaj (i-a). Entute, ĝi konstituas unu el la grandaj eltrovoj de Juan Ramón.

Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Aktualigo kaj aktualeco


Esperanta Antologio (EA) haltas en 1993; *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto-Literature* (CEOLE) haltas en 2007; *Historio de la Esperanta Literaturo* (HEL) atingas 2012; *Historio de la Akademio de Esperanto* (HdAE) havas kiel lastan jaron 2018.

Necesas do aktualigo, se ne paroli entute pri naciaj antologioj, kiuj plejofte restis limigitaj (kaj plu restas surmerkate) en siaj unuaj eldonoj aĝantaj jardekojn; ekzemple *Itala Antologio* aperis en 1987, sed kovras nur ĝis la XIXa jarcento, kaj ĝia poezia daŭrigo *Enlumas min senlimo* (1990) adekvate kovras ĝis la plenaj sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento (erare en la UEA-katalogo estas dirite “ĝis kelkaj voĉoj de la sesdekaj”).

La Baza Legolisto (BL) de Auld naskiĝis en 1988 kaj estis de li ĝisdatigita ĝis 1997, do antaŭ kvaronjarcento; ĝi enhavas 32 prozajn erojn kaj 27 poeziajn. Jam delonge, sed tute freŝe antaŭ semajno en la blogo “Literatura babilejo” aŭdiĝis el pluraj voĉoj deziro pri aktualigo; verŝajne la enmeto de pliaj dek prozaĵoj kaj 4-5 poemaroj, kune al ekvilibriga sarkado de kelkaj superitaj historiaĵoj, reprezentus hodiaŭ pli adekvate la nepre konindan bazon de nia literaturo. Eble nur problemo pri troa aŭdaco sin apudigi al Auld kaj remuldi lian liston retenas iun el la nunaj spertaj literaturistoj aŭ oftaj recenzantoj, eventuale akirintaj prestiĝon per premioj ricevitaĵ, de sinpropono por aktualigi tiun liston. Ragnarsson, pleje taŭga kompetentulo por tiu celo, bedaŭrinde ne faris, sed aktualigo ja neprus: Lowenstein, Mao, Tornado prave stamfadus por eniri. Ankaŭ jam enestaj, kiel Steele kaj Baghy, meritis alian enprenon, ekzemple, respektive, per *La fotoalbumo* aŭ *Sonĝe sub pomarbo*, kaj de Kock certe pli bone reprezentuĝis per *La konflikto de la epokoj* ol per *Fajro sur mia langa*.

Al novaj eldonoj prezentiĝas du vojoj: aŭ simple aldoni, konservante la jam fiksitajn elektojn de antaŭ jardekoj, aŭ remuldi la antaŭan, eventuale ion sarkante kaj enmetante novaĵojn.

Baza Literatura Krestomatio (BLK) estis unuafoje eldonita en 1979 en 3500 ekzempleroj, represita senŝanĝe trifoje; la nuna aktualigo (*Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio, 2019) plutenis la antaŭajn erojn kaj aldonis 160-paĝan novan parton *Postrikolto* kun 23 novaj aŭtoroj.




Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Nova libro: *Enkonduko en la morfologion de Esperanto*

Rokicki, Ryszard. *Enkonduko en la morfologion de Esperanto*. — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2022. — 88 p. — (Serio Scio, №11).



En la 56aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-56), kiuj okazis ĉi-somere en Klajpedo, Ryszard Rokicki prezentis sian libron *Enkonduko en la morfologion de Esperanto* (EME). Ryszard Rokicki dum preskaŭ 50 jaroj okupiĝas pri esperantologio. Li okazigis plurajn Sciencajn Interlingvistikajn Simpoziojn en Varsovio dum kiuj li ankaŭ prezentis siajn prelegojn, kompilis kaj redaktis tri volumojn de *Acta Interlinguistica*, redaktis kaj eldonis 21 kajerojn de *Informilo por Interlingvistoj* (1983-90) kaj organizis Esperantologian Konferencon dum la jubilea Universala Kongreso en Varsovio (1987). Lia ĉefa interesiĝobjekto estas lingvistikaj aspektoj de la fenomeno Esperanto, precipe pri ĝia morfologio, kaj apliko de lingvistikaj metodoj por priskribi ĝin.

EME prezentas metodojn, kiujn Rokicki aplikis en la analizo de kelkaj morfologiaj fenomenoj. La rezultoj donas elirbazon por pli ekzakta kompreno de la Esperanta vortformado kaj difino de reguloj, kiuj regas en ĝia morfologia sistemo, sendube unu el plej fascinaj fenomenoj de la lingvo.

Jouko Lindstedt en sia recenza eseo pri PAG esprimas la impreson, ke “la analizo de Kalocsay kaj Waringhien ne estas tia, kian farus profesia lingvisto” (1982). Michel Duc Goninaz konstatas, ke “priskribi la esperantlingvan vortkonstruon farigis per aliaj metodoj, ol ĝisnunaj” (2009).

Ĉu Ryszard Rokicki per siaj originalaj metodoj sukcesas enkonduki esperantologion al prezento de la vortformado konforma al la ĝeneralaj principoj de lingvopriskribo? Konvinkiĝu mem: legu, studu kaj konkludu.

Enkonduko en la morfologion de Esperanto estas kuneldonita de la Ruslanda eldonejo *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio kunlabore kun Centro pri Plurlingvismo kaj Interkultura Komunikado. Ĝi estas la 11a libro, eldonita en la serio *Scio de Sezonoj*.

Ĉi tiu libro de Ryszard Rokicki ekde la 22a de septembro 2022 estas mendebla kontraŭ 12 eŭroj ĉe la libroservo de UEA

<https://katalogo.uea.org/index.php?inf=1309>.

La eldonintoj esperas, ke EME – eble la plej grava esperantologia verko eldonita dum la lastaj jaroj – estos atente legita de ĉiuj interesiĝantoj pri la Internacia Lingvo.

Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov

“Kuru, knabo, kuru” – utila konsilo dum Holokaŭsto

Orlev, Uri. *Kuru, knabo, kuru* / Tradukis el la hebrea Tomasz Chmielik, Amir Naor. — Świdnik, Lublin: Ars Libri, 2019. 136 p., il.

Mi legis multajn librojn pri Holokaŭsto, ĉefe rememorojn kaj historiajn studaĵojn. Tamen tiu ĉi beletraĵo impresis min, ĉefe per simpleco de la rakonto, plian fojon konfirmanta ĝian aŭtentikecon.

Tra arbaroj kaj kamparo

La romano prezentas historion de okjara juda knabo Srul el la pola urbeto Błonie. Ĝi estas tipa por Holokaŭsto en Pollando. Unue oni kolektas ĉiujn judojn el vilaĝoj kaj urbetoj en geto lokita en pli granda urbo. Poste komenciĝas forkaptado, dum kiu nazioj, helpataj de judaj policistoj, forkaptas plej malriĉajn kaj malfortajn (do ekonomie senutilajn) judojn por sendi ilin al koncentrejoj. Fine la geto malaperas.

La familio de Srul penas saviĝi, fuĝante el la geto, sed laŭvoje ili estas kaptitaj de nazioj. La knabo sukcesas forkuri, kaj tiel komenciĝis lia vagado tra kamparo apud Varsovio. Malfacilas imagi tion, sed la knabeto dum unu jaro loĝis sola en arbaro, manĝis berojn, fungojn kaj bestojn, kiujn li sukcesis kapti, ofte krudajn. De tempo al tempo li venas al polaj setlejoj por ŝteli manĝaĵojn aŭ proponi sin kiel laboriston. La ŝtelado estas senkompate punata, la dungoproponoj foje akceptataj, sed sen iuj ajn faciligoj pro lia aĝo.

La aŭtoro prezentas la bildon tre konatan al mi el historiaj studaĵoj kaj rememoroj de aliaj polaj kaj ukrainaj judoj. Poloj plejparte traktas lin indiferente kaj suspekteme. Multaj denuncas lin al Gestapo, la aliaj simple forpelas, la triaj ekspluatas la etulon plenforte, sciante ke li ne havas alian elekteblon ol subiĝi kaj akcepti ĉion. Eĉ polaj partizanoj ignoras judajn infanojn en arbaro kaj lasas la vunditan knabon sola.

Inter plej bonaj estis virino, en kies bieno li perdis la manon, fortranĉitan de agrikultura maŝino. Malkovrinte lian judecon, ŝi simple vestas lin, jam handikapulon, donas iom da manĝaĵoj kaj sendas reen al arbaro. Alia virino, kies edzo forveturis al Gestapo por denunci la kaptitan knabeton, malfermas la pordon kaj diras al li: “Kuru, knabo, kuru”.



Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



Kvankam nek la eldonanto, nek la redaktoro de *La Ondo* povis veni ĉi-septembre al Poznano por ARKONES, nia gazeto ĉeestis tie danke al nia redakciano István Ertl, kiu prezentis, interalie, elekton el siaj “Spritaj splitoj kaj preskeraroj”, kiuj denove aperas en ĉiu *Ondo*. Dankon, amiko!

Ĉu preĝi aŭ ne preĝi?

La diferenco inter kredanto kaj ateisto estas tre eta. La ateisto opinias ke malĝustaj estas ĉiuj 4000 religioj, dum la kredanto pensas ke nur 3999.

Pia judo saviĝis post ŝipa katastrofo sur neloĝata insulo. Post unu jaro venis alia ŝipo por savi lin kaj trovis, ke li konstruis sur la insulo tri sinagogojn. La kapitano miris: “Por kio, vi ja estas sola judo ĉi tie?!” La judo nur ridetis: “Tre simple: tiun sinagogon mi frekventas ĉiutage, al la dua mi venas nur sabate, kaj al la tria mi eĉ unu paŝon ne faros!”

Rabeno kaj pastro diskutas pri avantaĝoj de siaj religioj. La pastro diras: “Hieraŭ mi sonĝis la judan paradizon. Terura loko! Svarmas judoj, ĉiuj babilas, svingas la manojn, bruas”. La rabeno respondas: “Mi ĉi-nokte sonĝis la kristanan paradizon. Pura, belega, kvieta – kaj eĉ unu animo ne estas tie!”

Paciento venas al psikiatro:

- Doktoro, post mi dum 40 jaroj marŝas nigraj, brunokulaj barbuloj.
- Hm, bone, mi registros. Via nomo?
- Moseo.

Jesuo kun la apostoloj venas al manĝejo:

- Ni bezonas tablon por 26 personoj.
- Kial, vi ja estas nur 13?
- Ni ĉiuj sidos ĉe unu flanko!

Edzo rakontas al sia edzino post vica kverelo: “Mi ekpensis, sed eble Dio estas virino? Mi do ne nur trafos en la inferon, sed eĉ ne komprenos pro kiu peko!”

Kiam mi estis etulo, mi preĝis, ke Dio donacu al mi biciklon. Sed poste mi komprenis, ke funkcias alia skemo: mi ŝtelis biciklon kaj preĝis pri Dia pardono.

Junulino konfesas al paroĥa pastro:

- Patro, mi pekis multe dum lasta semajno – mi drinkis, manĝegis, amoris...
- Mi scias, kara, mi scias...
- Sed kiel vi eksciis?
- Mi abonas vian konton ĉe Instagramo.

Ĉu vi scias ke en la mondo ekzistas dek kapoj de Johano la Baptanto, sed nur tri el ili estas aŭtentaj?

Plukis kaj tradukis **Stanislav Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Nekutima orgio

La bibliorgafiaj kaj piednotaj indikoj ne sekvas severe la kutimojn... (Rokicki R. *Enkonduko en la morfologion de Esperanto*. Kaunas: LEA; Kaliningrado: Sezonoj, 2022, p. 5)

Profesia suicido problemas

...li enmergiĝas en negocadoĉon, en periodo tre malfacila por elstari, eĉ por simple elviviĝi per tiu metio. (Minnaja C., Silfer G. *Historio de la esperanta literaturo*. La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro, 2015, p. 246.

Femina fetoro

... la milito estiĝis de la sama, baza instinko... (Hori Jasuo. *Obama vizitis la urbon Hiroŝimo*, esperanto-indre.com/IMG/pdf/OBAMAV_1.pdf)

Se vi bone parolas Esperanton, vin detenu

Se vi bone parolas Esperanton, sin proponu por helpi kungvidi la babilkunsidojn en Duolingo. (*Gazetara Komunikado de UEA*, 2022, №1065; rimarkis Kalle Kniivilä)

Pasivas nune idiomoj

En ĉiuj aktivaj lingvoj kaj en kelkaj modernaj... oni trovas akuzativon... (Waringhien G. *Lingvo kaj vivo*. La Laguna: Stafeto, 1959, p. 131; trovis Laurent Ramette)

La infana morotras'?

Morotras la arigado de tradukoj Renato Corsetti (*Nova afiŝo por la Esperanto Tago 2021 // Esperigaj Komunikadoj*, 30 maj 2022, p. 30; rimarkis Ibrahim Bryzgaloff)

Multa bruoj pri nenio

La vorteto “po”... en la Fundamenta Gramatiko... estas klarigita kiel “distribua numeralo”. (Atanasov A. D. *La lingva esenco de Esperanto*. Rotterdam: UEA, 1983, p. 138; rimarkis Ionel Onet)

Buspoloj kaj trampolinoj

Mi kredas ke la 56-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj estos... nova trampolino por efektiveco de viaj streboj kaj ideoj. (*Lumturo*, 2022, №2, p. 1)

Ĉiuj en la sama bano

... Klaipėda – urbo, kie ni kuvenas! (*Lumturo*, 2022, №3, p. 2)

Perantoj de *La Ondo de Esperanto*

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Norvegio: Esperanto-Oslo, Morenefarefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: oficejo@esperanto.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Slovakio: Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin. Rete: stano.marcek@gmail.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 134-paĝa septembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>